*Revuo*

# ESPERANTO

*Internacia*

N-ro 564 (11) Novembro 1952



*foto : Office Central Suisse du Tourisme, Zurich*

**Maloja, Svislando**

(*vidu paĝon* 323)

**45a Jaro** **Novembro 1952**
**N-ro 564 (11)**

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

*Fondinto :* H. HODLER

*Redaktoro :* HANS JAKOB

*Helpredaktoro :* MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.

Urĝajn informojn sendu rekte
al Rickmansworth

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

**Ĉion pri administrado** de UEA kaj de la revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj, anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

**Jara abono (1953) :** 15 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)
Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

**Tarifo por reklamoj :**

| | |
|---|---|
| 1 paĝo £6 | ½ paĝo £3 |
| ¼ paĝo 30 ŝil. | ⅛ paĝo 15 ŝil. |

**Anoncetoj pri korespondado :**
2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj

**Legantoj en 74 landoj**

**Eldonnombro 6000**

# *Enhavo*

**Specialaj artikoloj :** Paĝo

La socia pozicio de la Esperanto-Movado : *H. Jakob* .. .. .. 289
Kiel ni profitis la Infandesegnaĵojn : *Tibor Sekelj* .. .. .. 297
Pafataj bildoj : *W. H. Matthews* .. .. .. .. .. 299
Kongresen iru ni : *Mason Stuttard* .. .. .. .. .. 301
La kvara lingvo de Svislando : *D-ro Arthur Baur* .. .. .. 323

**Internacia Somera Universitato :** resumo de Oslo prelegoj .. .. 305

**Belartaj Konkursoj de U.E.A. :** 1952-raportoj .. .. .. .. 326
1952 (Prozo Originala) Rosario : *D. Richardson* .. .. .. .. 331
1953 Unua Komuniko .. .. .. .. .. .. 334

**Poezio :** Miaj Infanoj : *Eli Urbanová* .. .. .. .. 296

**La 38-a Universala Kongreso de Esperanto :** aliĝilo .. .. .. 4-a kovrilpaĝo

**Konstantaj Rubrikoj :**

Centro de Esploro kaj Dokumentado .. .. .. .. .. 320
El la Oficejo .. .. .. .. .. .. .. .. 290
Enigma Konkurso N-ro 72 .. .. .. .. .. .. 304
Esperantista Vivo .. .. .. .. .. .. .. 330
Internacia Konkurso 1952 .. .. .. .. .. .. 336
Nia Forumo .. .. .. .. .. .. .. .. 322
Oficiala Informilo .. .. .. .. .. .. .. 336
Radio kaj Esperanto .. .. .. .. .. .. .. 335
Tra la Mondo Esperantista .. .. .. .. .. 291

Revuo
# ESPERANTO
Internacia

N-ro 564 (11) Novembro 1952

## *La socia pozicio de la Esperanto-Movado*

LA studo pri la homa socio, t.e. la esploro pri sociaj fenomenoj, estas infano de la pasinta jarcento. Hodiaŭ ĝi estas scienco, kies teoriaj konkludoj formas la bazon por praktikaj bezonoj. La sociologio estas neforigebla parto de la homa agado—oni povus ĝin nomi *fiziko de la socio*. Stariĝas la demando ĉu la metodoj sociologiaj estas aplikeblaj al nia movado. Fari la demandon signifas ĝin respondi per 'jes'.

La movado por internacia lingvo estas same infano de la 19-a jarcento. La ideo de sinteza lingvo estas en si mem nenio nova, kiel ni scias el la priskribo de la problemo de universala lingvo. Apartenas al la pasinta jarcento, ke tiu ĉi problemo, konsiderita kiel pure lingva, fariĝis socia. La kaŭzo troviĝas en la intensigo de la trafiko; do, en la alproksimigo de la homoj.

La liberigo el jarcent-aĝaj ĉenoj turnis la rigardon de socie pensantaj homoj al la ne malmultaj makuloj de nia civilizo. Ekestis ĉiaspecaj movadoj por forigi ĉi tiujn makulojn. Plej okulvideblaj inter ĉi tiuj movadoj estas tiuj por la forigo de la sklaveco, la helpo al militviktimoj (el kio fariĝis la Ruĝa Kruco), la socia leĝaro por plibonigi la socian staton de la laborista klaso, la batalo kontraŭ la alkoholismo, kaj multaj aliaj movadoj parte iuj kun religia karaktero. Inter ĉi tiuj movadoj oni devas noti tiun por adopto de internacia lingvo, esence socia demando.

La estiĝo de ĉi tiuj "mondplibonigaj" movadoj estas dankata al homaranoj idealismaj, kun ofte tre praktika sento: Wilberforce, Abraham Lincoln, Henri Dunant, Karl Marx, William Booth, L. L. Zamenhof, por nomi nur kelkajn, estis tiaj. Ili transformis, se ne la homon, almenaŭ la socion por longa tempo aŭ grave influis ĝin.

En ĉi tiu kategorio de ribeluloj kontraŭ socia maljusteco apartenas la kreinto de Esperanto. Hodiaŭ, generacio post lia morto, lia spirita influo ĉiam sentiĝas inter la adeptoj. Simile kiel la supre cititaj ankaŭ Zamenhof estis konsiderita kiel "revulo," "utopiulo," por ne uzi epitetojn pli fortajn.

De socia vidpunkto la Esperanto-Movado estas frukto de anoj de la mezaj klasoj, kun je la supro malmultaj anoj el klaso materie sendependa, bonhava aŭ profesie bone gajnanta. Por la pioniroj de la komenca epoko, t.e. la personoj aliĝintaj al Esperanto inter 1888-1900, la lingvo de D-ro Zamenhof prezentiĝis kiel vera evangelio. Aro inter ili aŭ estis anoj de Volapük aŭ aŭdis pri ĝia ekzisto kaj la fiasko. Ĝenerale, kaj tio estis la kazo ĝis proksimume 1910, la aliĝintoj al Esperanto estis parte

lingve interesitaj, parte ili lernis la lingvon kiel interesan kompletigon de taga okupo.

La socia strukturo ĝisfunde ŝanĝiĝis post la unua milito kaj per la preskaŭ samtempa ekesto de laborista Esperanto-movado (ekde 1911-1912). La militsekvoj en preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj ĉefe pezis sur la mez-klasoj, nefacile organizeblaj por defendi ekonomian pozicion. Malaperis iom post iom el la Esperanto-Movado la kelkaj efektivaj riĉuloj aŭ socie eminentaj personoj. Alivorte, la movado por internacia lingvo rekrutigas siajn anojn el la depende laborantaj tavoloj sociaj, la salajritoj. Atenta observanto de okazaĵoj en nia movado konstatas tion per la malapero de "mecenoj", samideanoj kiuj grave finance subtenis la movadon. Alia aspekto de nia movado estas ĝia universaleco. Propagandanto por Esperanto sin turnas al homoj ĝenerale progresemaj, kiujn oni renkontas en ĉiuj sferoj sociaj. La movado estas neŭtrala: ĝi ne defendas iun doktrinon socian, politikan, mondplibonigan kun sekta karaktero. Nu, pri la "neŭtraleco" oni jam tiom skribis kaj disputis, ke ne estas necese reveni sur ĝia aspekto. Unu gravan progreson en la percepto pri la humaneca rolo de nia afero oni faris, akceptante la deklaron pri la hom-rajtoj kiel gvidlinion. La hom-rajtoj interalie fiksas kiel neŝanĝeblan la rajton de la homo je sia nacia aŭ genta lingvo—kaj tion ni senkondiĉe subtenas—.

Se ni deklaras nin "neŭtralaj", t.e. ni akceptas la mondon tia, kia ĝi estas, tiam Sennacieca Asocio Tutmonda staras sur alia platformo. Ĝi estas, aŭ volas esti, "klasbatala" kun kleriga tasko. "For la neŭtralismon" estis la batalvoko de SAT. Tamen ankaŭ ĝi estas "neŭtrala". Eble, iuj protestas pro tiu ĉi diraĵo! Pruvo pri tio estas ke, rilate je ĉiuj tendencoj de la klasbatalo, kaj de politikaj doktrinoj 'maldekstraj', de l'anarkismo ĝis leninismo, SAT kiel organizaĵo rilatas neŭtrale kaj akceptas kiel membrojn, la adeptojn de ĉi tiuj apartaĵoj, eĉ formante sekciojn. Do, ambaŭ tutmondaj organizaĵoj por Esperanto, UEA kiel SAT estas neŭtralaj en sia specifa medio.

**Konkludo:**


La Esperanto-Movado kiel tutaĵo estas hodiaŭ grava socia elemento.

Pro sia universaleco ĝi ne estas periferia t.e. vivante kaj agante ĉe la rando de la socio. Ĝi ne estas sekto apartiĝanta aŭ sin enfermanta aŭ izoliĝanta de la cetera mondo.

Pro la penado por interpopola kompreno kaj pro la praktika servado, ĝi fariĝis eminenta faktoro en la socia vivo, ne plu malatentebla.

*Hans Jakob.*

---



# El la Oficejo

**Fervoja Terminaro.** Oni bonvolu korekti preseraron en la Terminaro, kiu aperis en la Dua Parto de la nunjara jarlibro. Sur paĝo 44 anstataŭ 'Tanĝento' devas esti 'Tangento' ('tanĝento' estas tute ĝusta en aliaj lokoj, ĉar la signifo estas alia).

**La Stumpaj Arboj.** Ni pardonpetas pro preseraro sur p. 280 de nia oktobra numero, ĉar ĝi tute aliigas la sencon. En la tria verso de la II-a parto *en la humo* devas esti *el la humo*.



# Tra la Mondo Esperantista



## Aŭstrujo

*Skisporta libertempo.* Aŭstraj junuloj invitas Esperanto-lernantojn el aliaj landoj partopreni komunan 8-tagan skikurson en unu el la plej belaj vintrosportregionoj en Aŭstrujo. Ĝi okazos en Marto 1953: tagaj elspezoj estos po proks. 25 aŭst. ŝil. (eventuale oni povos pruntepreni skiojn). Petu informojn sendante respondkuponon al S-ro Anton Konecny, Hernalser Hauptstrasse 110, WIEN 107, Aŭstrujo.

*Societo de Aŭstriaj Esperanto-Instruistoj* ricevis duan subvencion de la Instruministerio. La grandan vienan lernej-ekspozicion ĝi partoprenis per aranĝo de varba stando (fakinstruisto A. Konecny deĵoris ĉe ĝi).

*Poŝtistoj.* La Ĝenerala Poŝtdirekcio dekrete konsentis ke Esperantistaj poŝtistoj povu porti insignon dum deĵoro. S-ro Janecka, estro de la poŝtista Esperanto-fakgrupo, ricevis la unuan.

*Esperantaj Informtabuloj.* Laŭ iniciato de la fervojista Esperanto-fakgrupo (estro S-ro Angermayer en Linz) la ĝeneraldirekcio de la aŭstraj fervojoj konsentis pri la senkosta fiksigo de Esperantaj informtabuloj en ĉiuj stacidomoj en lokoj, kie troviĝas Esperantistoj.

*Socialista Junulara Tendaro.* Informtendo pri Esperanto estis arangita: deĵoris S-ro Haberl kaj aliaj.

## Brazilo

*La Ĉefepiskopo de Rio de Janeiro,* Lia Eminenta Moŝto Kardinalo Jaime de Barros Câmara, akceptis en speciala aŭdienco komisionon konsistantan el Prof. Carlos Domingues, D-roj Jose A. Pinto do Carmo kaj Mario Ritter Nunes, ĉiuj estraranoj de Brazila Esperanto-Ligo. Li akceptis lukse binditan ekzempleron de la libro *Por iu pli bona mondo,* kies antaŭparolon li mem verkis, kaj kiun la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko dediĉis al la XXII-a Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj, okazinta en Romo dum la Sankta Jaro 1950-a.

Sciiĝinte pri la prospera Esperantista movado en Brazilo, Lia Kardinala Moŝto deklaris, ke li "donos al ĝi sian plenan apogon, tial ke ĝi estas afero dediĉita al la bono".

## Britujo

*Ekspozicio en Blackburn.* Ĉirkaŭ 1200 personoj vizitis la ekspozicion en Blackburn je septembro 24–30. La ejo estis granda ĉambro en la Muzeo Lewis, kiun la urbkonsilantaro luigis senpage. Aranĝita en sekcioj, literatura, religia, edukada, mondamikeca, scienca, turisma, junulara, la ekspozicio elmontris 600 erojn, kiuj estis bele muntitaj kaj artiste prezentitaj. La urbestro, akompanata de la urbestrino kaj de la loka Direktoro de Edukado, solene malfermis ĝin. Multaj geknaboj kaj plenaĝuloj ricevis sian unuan lecionon

pri Esperanto kaj oni vendis multajn lernolibrojn kaj disdonis kelkcentojn da propagandiloj.

La organizantoj bone atentis la konsilon de D-ro Lapenna (en la Julia *Esperanto*) kaj la rezulto estis vere rimarkinda. Nenio malpura aŭ malaktuala estis akceptita kaj ĉiuj afiŝoj estis bele presitaj ; klarigaj afiŝetoj apud bildoj, poŝtkartoj, k.t.p. estis maŝinskribitaj ; 22 diversaj "ŝlosiloj" estis aranĝitaj laŭ la formo de ŝlosilo. Por bone bildigi la tutan ekspozicion oni bezonus 5 aŭ 6 fotografaĵojn.




*foto : W. Talbot*

*Jen nur unu sekcio el la sep kiuj konsistigis la ekspozicion en Blackburn, Anglujo. Oni povas vidi plurajn kongresfotojn, foton de la jaĥto "Nova Espero," ĉiutagan programon de la Esperantaj radio-dissendoj, foton de la Esperantistaj policanoj en Hamburg, k.t.p. Sur la tablo estas multaj poŝtkartoj.*

## Gvatemalo

*Ses kursoj.* La vigla ekfloro de la Movado estas videbla de la fakto, ke en la ĉefurbo estas gvidataj samtempe ses kursoj : unu perfektiga, kvar elementaj parol-kursoj kaj korespondo kurso por tuta Mezameriko. Gvidas la perfektigan kaj du elementajn Licenciato Tibor Sekelj, po unu elementan D-ro Jules Bonge kaj S-ro Haraldo Hernandez, kaj la korespondan prizorgas S-ro Raul Ramirez. Partoprenas la kursojn ĉ. 120 gelernantoj.

*Societa vivo.* La Asocio, fondita antaŭ malpli ol unu jaro, jam havas propran ejon kun biblioteko, en kiu la anaro (ĉ. 30) kunvenadas ĉiu-semajne, kaj organizas ĉiumonate po unu amuzan vesperon, unu "Vivan gazeton", unu organizan kunvenon, unu propagandan vesperon en publika salono, kaj unu ekskurson. Se al tiu aktiveco oni aldonas la eldonadon de

propra gazeto, ni povas diri, ke la gvatemala Esperantistaro havas viglan societan vivon.

*Ekspozicio de Infandesegnaĵoj.* Vidu paĝon 297.

*Popolkanta Konkurso.* Vidu p. 295.

## Indonezio

S-ino Datoe Toemenggoeng, kiu faris I.S.U. prelegon ĉe la Kongreso en Oslo (vidu p. 308), iniciatis la fondon de Indonezia Universala Esperanto-Asocio.




*foto : Aneta*

*La Estraro de I.U.E.A. antaŭ la Parlamentejo en Djakarta, Indonezio (S-ino Datoe Toemenggoeng estas la dua dekstre)*

## Koreujo

*Universitato Chunggu.* Ni citas el letero de nia D., S-ro Hengwi Hong :

"Kiel mi jam skribis al vi, la nombro de Esperanton lernantaj studentoj pli multiĝis ol en la komenco kaj lastatempe nombras ĉirkaŭ 300, sed mi devas verdiri la fakton al vi, ke multaj el ili lernas ĝin nur pro la devigeco de leciono, ĉar la cirkonstanco en tiu ĉi lando tre malfavoras al tia movado, kia estas la Esperanto-movado : precipe pro tio, ke en nia universitata biblioteko **ne troviĝas legendaj Esperanto-libroj por** la studentoj, kaj ili ĝis nun ne povis trovi eĉ unu Esperantiston el multaj alilandanoj, kiuj venis al nia lando. Sed kompare kun la malfavora cirkonstanco ne malmultaj studentoj fervoras pri nia movado. Por pli fervorigi ilin mi devas pli multigi legendajn Esperanto-librojn en la universitata biblioteko, ĉar ili deziras pli multon scii per la ellerno de fremdaj lingvoj—mi opinias, ke tio estas natura sintenado de studentoj.

Per kia maniero mi povu abundigi Esperantajn librojn en la biblioteko, malgraŭ la manko de la rimedo sendi monon alilanden ?

Por solvi la mankon mi intencis eldoni Esperanto-librojn ŝanĝeblajn kun bezonataj en alilando eldonitaj libroj Esperantaj, sed por eldoni Esperanto-librojn mankas presliteroj kaj kapablaj kompostistoj en tiu ĉi milite ruinigita lando ; pro tio mi

estis devigita elekti nur tion, kion oni povas represi per foto sen kompostado, kaj mi lastatempe represis (per la elspezo de la universitato) lernolibron *Tra la jaro*, kies represpermeson ni akiris pere de S-ro A. C. Blatt. Kvankam mi ĉiel klopodis por bonkvalite eldoni ĝin, tamen la rezulto perfidis mian deziron pro la manko de bonaj maŝino, inko kaj tekniko. Bonvolu anonci la fakton en *Esperanto* por ke multaj el la legantoj bonvolu interŝanĝi siajn Esperantajn librojn kun la represaĵo por ke ni povu pli multigi Esperanto-librojn en la universitata biblioteko."

* * *

Legantoj kiuj agos laŭ tiu sugesto, bonvolu sendi la librojn rekte al S-ro Hengwi Hong, Chunggu Universitato, TAEGU, Koreujo.



*La fondkunsido je* **15** *julio* **1952** *de la Korea Studenta Esperanto-Societo ĉe Chunggu Universitato. En la* **1**-*a vico (de dekstre) la* **5**-*a estas Prof. Hengwi Hong.*
*En la* **2**-*a vico (de dekstre) la* **2**-*a estas S-ro U. S. Chung, ĝen. sek. de K.S.E.S.*

## Nederlando

*La Fromaĝvendejo en Alkmaar.* Dum la nuna somero Esperantisto ĉiam deĵoris en la turisma oficejo por helpi Esperantistajn vizitantojn. Esperantaj menuoj estas haveblaj en pluraj restoracioj tie.

*Komunuma Muzeo, Amsterdam.* Esperanto parolata.

*Frans Hals Muzeo, Haarlem.* Esperanto parolata.

*Flor-aŭkcio, Aalsmeer.* Ankaŭ ĉi ĉestas Esperanto parolata.

*Grandmagazeno "de Bijenkorf"* en Amsterdam, Rotterdam kaj den Haag presigis menuon Nederlandlingve kaj Esperante, haveblan laŭ peto.

## Norvegujo

*Haugesund.* La gesamideanoj sukcese partoprenis la procesion je la norvega festotago, portante flagojn Esperantajn kaj de 15 diversaj nacioj. Krome sur ornamita ŝarĝaŭto estis anoj vestitaj per diversnaciaj kostumoj. La tuto altiris konsiderindan atenton.

*Jarkunveno de Norvega Esperantista Ligo* okazis en Horten ĉe la okcidenta bordo de la Oslo-fjordo. Oni raportis, ke la jaro 1951 montris multajn signojn de bona progreso. La laboro de la kvar eksterlandaj instruistoj kune kun la efiko de la leterkurso kaj de la "sistema varbado", kiun la NEL estraro administras, rezultis en bela kresko de la membronombro: tamen, tro malgranda parto de la kursanoj aliĝas al la kluboj. S-ro Mason Stuttard faris interesan kaj pensigan paroladon pri *Kelkaj konsideroj pri instrumetodoj kaj ĝenerala propagando*, kiun oni multe laŭdis kaj kiu kaŭzis grandan diskuton.

## Studenta konferenco en Schluchsee

Proksimume 20 delegitoj el 7 landoj (Danlando, Francujo, Germanujo, Jugoslavujo, Nederlando kaj Usono) partoprenis dum la tagoj 17-24 aŭgusto la Internacian Konferencon de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejanoj en Schluchsee (Schwarzwald), Germanujo.

La invitintoj de la konferenco estis Allgemeiner Studentenausschuss-Auslandsreferat (ASTA) der Universität Freiburg, Germana Esperanto-Junularo kaj Studenta Esperanto-Klubo, Freiburg. Konferencejo estis la "Domo por internaciaj kunvenoj" de la universitato en Freiburg.

Dank' al subvencioj de la germana federacia ministerio de internaj aferoj kaj de la franca kaj usona alt-komisariejoj kaj pro la 50-procenta rabato de la germana federacia fervojo la aranĝo estis tre malmulte-kosta por la partoprenantoj. La antaŭpreparadon kun intertraktoj kun la aŭtoritatoj lerte gvidis la

**ATENTU !**

**"LA INFANOJ DE LA MONDO KANTAS"**

estos la titolo de grava interlerneja konkursa prezentado en Gvatemalo, en Julio de 1953, organizita de la Direkcio de Belartoj de la landa Edukministerio. En ĝi diversaj lernejoj prezentos scenon kun folklora kanto el malsama popolo.

Por ties sukceso ni afable petas la Esperantistojn de ĉiuj landoj helpi al tiu internacia aranĝo organizota per Esperanto. Bonvolu pere de iu kant-instruisto aŭ eduka aŭtoritato havigi kaj elsendi al ni la jenon :

1. Muziknotojn por kanto kaj pian-akompano, aŭ por plurvoĉa ĥor-kantado, de iu folklora nacia kanto.
2. Ĝian tekston en la nacia lingvo.
3. Sub ĝi la legmanieron kun Esperanta ortografio.
4. La tradukon de la teksto al Esperanto.
5. Priskribon de la loko kaj cirkonstancoj en kiuj oni ĝin kantas : ĉu viroj, virinoj, aŭ ambaŭ kune ; ĉu dum laboro, danco, festo, aŭ religia procesio, k.t.p., kaj mallongan priskribon de la okazaĵo ; ĉu en urbo, vilaĝo aŭ kamparo ; ĉu en ĉambro aŭ ekstere.
6. Priskribon aŭ prefere bildon de la nacia kostumo uzata, aŭ eble, bildon de la tuta sceno.

Al ĉiu kunlaboranto en tiu ĉi internacia festivalo, ni antaŭdankas, kaj ni reciprokos per samspeca materialo pri Gvatemala folklora kanto, kun klarigoj kaj ilustraĵo multkolora, kaj ankaŭ ni alsendos al ĉiu kun-laboranto iun alian donaceton.

Por konvinki la mondon ni devas elmontri, ke Esperanto estas praktike uzebla kaj uzata en la internaciaj rilatoj. Kontribuu !

Adreso :
"Popolkantoj",
Dirección General de Bellas Artes,
Callejón Manchén 14—Gvatemalo,
Centra Ameriko.

Freiburg-a studento, S-ro Michel Schmidt.

La konferenco pritraktis jenajn 4 problemgrupojn: 1. La sociaj problemoj de la studentaro en diversaj landoj. 2. Internacia studenta laboro. 3. Scienco kaj Esperanto. 4. Neceseco kaj taskoj de Internacia Federacio de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejanoj. Krome okazis eksterprogramaj prelegoj. Speciale menciinde estas, ke la Esperanto-lektoro de la komunuma universitato en Amsterdam, S-ro Sig. Pragano, verve kaj elegante prezentis ĉefverkojn de la Esperanta literaturo, kaj ke profesoro G. Iggers de la negra altlernejo en Little Rock, Usono, tre interese rakontis pri la negra problemo en Usono.

Je la fino de la konferenco oni fondis la novan organizaĵon, Internacia Federacio de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejanoj, kies celo estas akceli internacian kunlaboron de studentoj kaj altlernejanoj per Esperanto. Tiucele IFESA eldonos revuon, aranĝos internaciajn renkontojn, funkciigos fakan informservon, klopodos starigi kunlaboron kun internaciaj studentaj kaj kulturaj organizaĵoj k.s. Membro povos esti ĉiu, kiu studas aŭ studis en universitato aŭ samranga altlernejo.

La fonda kunveno unuanime elektis kiel prezidanton S-ron J. Vesterland-Andersen, Kopenhago, kaj kiel honoran prezidanton Prof. D-ron Giorgio Canuto, rektoro de la universitato en Parma, Italujo.

La eldonota revuo estas *La Studento*, kiun nuntempe eldonas Esperanto-Federacio de Danaj Altlernejanoj. La administrejo de la federacio kaj la revuo estas en: Laksegade 35, Kopenhago K, Danlando.

La konferenco decidis, ke la federacio okazigu la 2-an IKESA en Ljubljana, Jugoslavujo, en la semajno post la Universala Kongreso en Zagreb.

*H. V. Rasmussen.*

---

**Eli Urbanová :**

## *Miaj infanoj*

*Animon mian*
*vibrigas ofte la sopir'*
*je iluzi' ;*
*dum pompas fantazi',*
*mi koncipita de inspir'*
*estadas.*

*Por longe fuĝas*
*trankvilo ĉiu kaj kviet' ;*
*en la ferment'*
*de fajre brula sent'*
*sin trajtas klare poemet'*
*embria.*

*La streĉ' kulminas*
*kaj kristaliĝas penskonker'*
*sub plumretuŝ' ;*
*min ŝiras la akuŝ',*
*sed kron' poenta tra l'sufer'*
*jam brilas.*

*En vers' vinditaj*
*ridetoj, ĝemoj de la kor',*
*mi amas vin*
*jen kiel la patrin'*
*infanojn siajn en dolor'*
*naskitajn.*

**Tibor Sekelj :**

# *Kiel ni profitis la Infandesegnaĵojn*

UNUE pere de anoncoj kaj poste pere de ĵurnalaj sciigoj, la Esperantistaro eksciis, ke en Gvatemalo oni preparis internacian ekspozicion de infandesegnaĵoj. La preparo de tiu evento estis iom pli longa ol antaŭvidita, pro la malrapido de la transmara poŝtservo, tiel ke nur la 25-an de junio povis esti malfermita la ekspozicio. Kaj jen informo pri ĝi, eventuale utiligebla aliloke.

**La Organizantoj.** En pluraj gazetoj mi legis, ke tiun elmontron organizas la gvatemalaj Esperantistoj, aŭ la Asocio. Tamen tio estas erara. En Oktobro pasintjara, kiam mi decidis okupiĝi pri la afero, mi proponis ĝin rekte al la Direkcio de Belartoj de la Edukministerio, kaj ĝia estro, Prof. Oskar Vargas Romero, kaj la ĉefo de la estetika Edukado, Prof. Gilberto Zea Avelar, tre entuziasme akceptis la ideon, kaj decidis agi kiel organizantoj, farante el tiu ekspozicio oficialan, landan okazaĵon. Samtempe oni invitis min partopreni en la organiza komisiono, kune kun du inspektoroj pri desegnado de la Belarta Direkcio, Prof-ino Maria Christina Bar.ios kaj Prof. Manuel Galvez Ruiz.

Kaj jen estas la vojo al la venko. Se ni mem estus farintaj la tuton, ĝi certe havus gravecon. Sed multe pli grava estas la fakto, ke ni starigis Esperanton je la dispono de oficiala instanco, kiu uzas ĝin por propraj celoj, kaj tiel vidas senpere la utilecon de la internacia lingvo.

**Respondo al la alvoko.** Kiel respondo al la kvin anoncoj publikigitaj en diversaj Esperanto-gazetoj, alvenis proksimume 1.300 infandesegnaĵoj kaj pentraĵoj el 21 landoj, kaj tiu fakto igis la direktoron de Belartoj diri : "Esperanto havas iun mistikan, magian forton sur siaj adeptoj, kaj tiu forto estas uzebla por la progreso de la kulturo".

El kelkaj landoj alvenis malmultaj desegnaĵoj, apenaŭ sufiĉaj por plenumi la celon. El aliaj, kiel ekzemple el Nederlando, Germanujo, Anglujo kaj Svedujo, alvenis tiom da desegnaĵoj, ke ni havis veran malfacilaĵon por elekti la dek aŭ dekkvin plej bonajn, kiuj reprezentos la koncernan landon en la ekspozicio. Kompreneble, oni ne povas elmontri ĉiujn verkojn, ĉar tio kaŭzus grandan malekvilibron inter la diversaj partoprenantaj nacioj, kaj krome, tia granda kvanto da desegnaĵoj ne permesus ĝeneralan superrigardon pri la afero al la vizitantoj. Sed ni decidis realigi alian, vojaĝantan ekspozicion, kun la verkoj restintaj ekster tiu ĉi ekspozicio.

**La rekompenco.** Ekde la komenco ni promesis al ĉiu alsendanto iun rekompencon, kiu konsistas, laŭ lia elekto, el unu funto da kafo, aŭ kvanto da desegnaĵoj de gvatemalaj infanoj, aŭ uzitaj poŝtmarkoj el tiu ĉi lando. La preferoj de la sendintoj estis proksimume egalmezure dividitaj inter la tri specoj de rekompenco, kaj en tiuj ĉi tagoj ni estas preparantaj la forsendon de 100 funtoj da kafo, 800 infandesegnaĵoj kaj 2.000 poŝtmarkoj.

Kiam mi proponis tiun ĉi solvon al la direktoro de Belartoj, li konsideris tute logika, ke persono, kiu faras klopodojn kaj elspezojn por havigi al

ni la bezonatan materialon, meritas rekompencon. Kaj mi opinias, ke tiun ĉi sintenon ni devas klopodi ĝeneraligi. Ni tro ofte vidas anoncojn kaj ricevas cirkulerojn de Esperantistoj, kiuj nur petas ion, sed ne proponas kontraŭservon.

Sed tie ne haltas la afero. Ĉiu opa infano kontribuinta per iu desegno, ricevos multkoloran ilustritan poŝtkarton pri nacia kostumo, kaj ankaŭ plaĉan katalogon pri la ekspozicio. Krom tio, la infanoj kies verkoj estas elektitaj por la ekspozicio, ricevos diplomon pri partopreno, eldonitan oficiale de la Edukministerio de Gvatemalo. Bedaŭrinde la indikoj ne ĉiam estis ekzaktaj. Eĉ venis desegnoj sen nomo kaj sen indiko de la urbo. Tiel pluraj restos sen la rekompenco, kaj ankaŭ la katalogo estos mankohava.

**La rolo de Esperanto.** La anoncoj por kunigi la materialon estis faritaj en Esperantaj gazetoj, do sekve la tuta korespondaĵo, kiel la klarigoj sur la bildoj, alvenis preskaŭ ekskluzive en tiu lingvo, kaj la organizantoj forte bezonis helpon de Esperantisto. Ekde la komenco mi proponis mian kunlaboron kun la kondiĉo, ke en ĉiu propaganda artikolo pri la ekspozicio oni menciu la internacian lingvon, kiu ĝin ebligis. Kaj tiel oni faris en multaj artikoloj, el kiuj plurajn mi mem verkis. Krom tio, la ilustrita katalogo de la ekspozicio estas presita dulingve, hispane kaj Esperante. Sed la plej grava el ĉio estas, ke la diplomoj por la partoprenantoj, eldonitaj oficiale de la Edukministerio, enhavas, egalvalore, tekstojn en la hispana lingvo kaj en Esperanto. Jen senrezerva rekono de la fakto, ke dokumento, direktata al aro da personoj diversnaciaj, devas esti redaktata en la oficiala lingvo de la eldonanto, kaj en la internacia lingvo. Mi ne scias ĉu iu alia edukministerio jam estis eldoninta diplomojn kun teksto en Esperanto, sed ĉiuokaze, tiu ĉi estas valora kaj citinda precedento.

**La Ekspozicio.** La sukceso de la ekspozicio estis sensacia, kaj la multnombraj artikoloj pri ĝi faris valoregan propagandon por nia ideo. En la ekspoziciejo ni preparis standon pri la korespondaĵoj alvenintaj rilate la eventon, kaj alian standon dediĉitan al Esperanto. Tie ankaŭ ni disdonadis flugfolion pri la internacia lingvo, kaj pri niaj kursoj.

**Sekvoj.** Pere de tiu ĉi okazaĵo la oficialaj institucioj kaj la publiko ĝenerale de la tuta lando sciiĝis pri la praktika utiligeblo de Esperanto, per "rekta metodo". Ĝi estis precipe forta argumento antaŭ la registaro kaj antaŭ la instruistaro, sed ties praktikaj sekvoj estos videblaj nur iom post iom.

La momento de la sukceso estis konvena por ke mi faru novan proponon antaŭ la Direkcio de Belartoj. Ĝi konsistas el la organizo de interlerneja konkursa prezentado titolita *La infanoj de la mondo kantas*, kunigante pere de Esperanto folklorajn kantojn el diversaj landoj, propono, kiu estis entuziasme akceptita. (Vidu paĝon 295.)

Vidinte tiel ne nur la utilecon sed eĉ la nepran bezonon de Esperanto por internacia kultura kunlaborado, la Direkcio de Belartoj invitis min gvidi kurson de Esperanto speciale por ĝia personaro. Kaj tiel, iom post iom, aferoj laŭŝajne sensignifaj, malfermas la vojojn al la fina celo.

*Licenciato Tibor Sekelj,*
*Gvatemalo.*
*Komitatano de UEA.*

**W. H. Matthews :**

# *Pafataj bildoj*

ĈU vi povas imagi inkon fluanta sen ingo, aŭ farbaspergilon pafanta kun nevidebla farbofluo ? Se ne, vi devas provi por kompreni kiel estas produktataj la televidaj bildoj.

Vi scias, ke ekzistas materialoj, kiuj nature brilas, ekzemple ĉe la montriloj de brakhorloĝoj kaj la korpoj de iuj fiŝoj. Tiu ĉi materialo brilas pro la spontaj eksplodoj de atomoj de la materialo mem—radiumo ekzemple. Nu estas materialoj, kiuj brilas, kiam ilin eksplodigas eksteraj influoj, kaj tiuj estas uzataj ĉe la bildfaco de la katod-radiiga tubo de la televido.

En la makrokosmo, se planedo el la granda spaco enirus tiun ĉi universon, okazus grandega eksplodo atoma. Unu el niaj planedoj elirus kaj la eniranta planedo, per nova ordo, rondirus nian sunon. Ordo regus denove kaj la neevitebla radiado—la ĉiama rezulto de atoma eksplodo—forirus.

Ĉi tiu radiado estas tia, kian oni uzas por la televido, kun la escepto, ke ĝi estas el elektronoj, malgrandaj atompartoj.

Ĉe la malantaŭa parto de la televida tubo estas la elektronforĵeta filamento, kie komenciĝas la ĝisbildfaca vojaĝo de la elektronoj. Tuj post la forĵeto la irrapideco de la elektronoj estas akcelata kelkfoje kaj tial la rapideco de la elektronoj grandegiĝas kiel pafaĵo el pafilo. Kiam la elektrono aliras la bildfacon ĝi eniras rapidege iun ajn atomon tie, kaj kiel en la makrokosma ekzemplo eksplodo okazas.

Desegno 1. Skema desegno de la katoda radiiga tubo. Jen la kodo :


Ka : la katodo, kie komenciĝas la elektrona fluo.

K : estas la reguliga krado, kie estas reguligata la fluo.

A1 kaj A2 : estas la punktoj de la altpotencoj, kiuj akcelas la elektronfluon ĝis tia rapideco estas atingita, ke la elektronoj flugas kvazaŭ pafitaj el pafilo.

X1 kaj X2 : estas la elektrodoj, kiuj reguligas la fluon supren-malsupren, kaj


Y1 kaj Y2 : reguligas la fluon dekstren-maldekstren.




Unu el la elektronoj de tiu atomo estas forpuŝata kaj la nova enirinto restas rondiranta kiel ĝia antaŭulo, kiu foriras per iu ajn vojo ebla per la grafito teganta la internon de la tubo. Jen estas la fluo sen ingo ĉar la tubo havas vakuon interne kaj la fluantaj elektronoj "fluas" nevideble, sed precizege, gvidataj survoje per elektraj potencialoj ĉirkaŭstarantaj. La regula glitanta ŝanĝiĝo estas reguligebla per la aliigo de tiuj potencialoj kaj la ordo de aliro je la bildfaco estas regebla.

Tial la punktaliron de vojaĝantaj elektronoj oni povas ŝanĝi de maldekstro dekstren kaj supre-malsupren laŭ ordo montrata per la ilustraĵo.

La bildo estas konstruata el kvazaŭ neinterrompita linio, kiu komenciĝas




Desegno 2 : Montras kiel la linioj interplektiĝas. La irado de A ĝis B okazas dum nur 10,000-ono de sekundo, kaj de B ĝis C preskaŭ nekalkuleble rapide.


ĉe la supra maldekstra angulo kaj iras ĝis la dekstra rektlinie, reiro ĝis la maldekstra flanko sed du liniojn malsupre k.t.p. ĝis la malsupro. Tiu ĉi irado okazas dufoje en ĉiu bildo, je la unua irado je linioj 1, 3, 5 k.t.p. kaj la duan fojon je linioj 2, 4, 6 k.t.p. ĝis pli ol 400 linioj.

Oni utiligas, kiel en la kino (lumbildoj ordinaraj), la malrapidecon de la adapteblo de la homa vidpovo al subitaj, rapidegaj, ŝanĝoj, kun la diferenco, ke ĉe la kino la bildo estas ŝanĝata 16 fojojn en sekundo, kaj ĉe la televido la bildo estas "skribata" entute 50 fojojn en sekundo (aŭ 100-fojon por duonbildo, laŭ la skemo uzata kaj priskribita ĉi-supre).

Se la bildo estus produktata nur unufoje per 400 linioj, la bildo aspektus pli brila je la malsupro ĉar la supra parto estas produktata la unua ; tial por korekti tion oni produktas ĝin laŭ dufoja skemo. Por la konstrumaniero studu la desegnon ĉi tie presata.

Maldekstre estas la bildo de la unua liniskribo, kaj dekstre de ĝi la dua liniskribo ; bildo rezultanta el surkonstruo de unu bildo sur la alian, kio donas la perfektan bildon, montriĝas tute dekstre. La "nevidebla plumo" trapasas la bildformon, kiel vi povas vidi, kaj la elektronoj estas allasataj nur tiam kiam oni deziras vidi lumon, kaj tial la bombardo kaj lumigado de la bildfaco okazas laŭ kontrolaj influoj donataj ĉe la kontrolpunkto en la tubo.

La pafilo pafas, sed la pafaĵoj trafas nur la brilajn partojn de la celata televidbildo.



La granda desegno montras la unuan provon, la duan provon kaj la vidatan bildon.

**Mason Stuttard :**

# *Kongresen iru ni !*

## *Kelkaj konstatoj kaj observoj*

KVANKAM mi jam havis sperton pri postkulisa laboro en du Universalaj Kongresoj—Bournemouth kaj Munkeno—la tutjara laboro en Oslo malkovris al mi multajn novajn facetojn de organiza kaj administra agado kaj . . . de la homa psikologio. Pro evidente ekzistanta miskompreno flanke de kongresanoj pri multo en la kongresa organizado mi esperas, ke kelkaj klarigaj vortoj ne estos maltrafaj. Iu saĝulo iam diris, ke erari estas home, sed persistas en sia eraro nur stultulo. Kongresanoj ne estas stultuloj, tamen troviĝas inter ili pluraj homoj, kiuj ne agas prudente kaj el tio iafoje sekvas konfuzo.

Laŭ programa vidpunkto, t.e. laŭ la ekstera aspekto, U.K. estas kompare facile organizebla. La kunordigo de apartaj aranĝoj, prelegoj, fakaj kunvenoj estas problemo kabineta, sed ne persona, kiun oni povas ordigi ĉirkaŭ tablo kun minimuma konsultado kun individuoj. La aranĝado de loĝejoj, rezervoj de ekskursaj biletoj k.s. kontraŭe estas esence persona kaj subjektiva afero, fluida, komplika kaj ofte ĝena. Tial okazas, ke U.K. laŭ ekstera aspekto povas esti sukceso dum laŭ persona vidpunkto ĝi ne kontentigas.

En Oslo okazis neordinara fenomeno. En la lasta monato de la aliĝa periodo, do en *dekunuono* de la kongresa jaro, sin anoncis *pli ol kvinono* de la tuta kongresanaro ! Estas necese aserti jam nun, ke neniu L.K.K. povas sukcese aranĝi U.K. surbaze de tia aliĝmaniero. Rilate al presigo de kongresa libro, mendo de insignoj, rezervo de salonoj, ordigo de aŭtobusoj kaj manĝoj por ekskursoj, disponigo de deĵorantoj k.s. L.K.K. devas jam antaŭ kelkaj monatoj fari siajn decidojn. Se do en Oslo okazis iaj mistaksoj pri la nombro de kongresanoj (iuj gazetoj menciis limigitan lokon por la Interkoniĝa Vespero ; la kongresaj libro kaj insigno elĉerpiĝis ; la nombro de biletoj por la Balo estis limigita) tio sekvis rekte el la fakto ke tro multaj kongresanoj nur en la lasta monato sin anoncis. Estas do bedaŭrinde, ke iuj kongresanoj kiuj iel suferis pro tio, ne konsciis sian propran kulpon, sed riproĉis kaj kelkfoje eĉ insultis la fidelajn deĵorantojn de la kongreso kiuj senescepte—ni emfazu ĉi tion—laboris sen ia ajn pago aŭ honorario por la bono de la afero.

Jam dum kelkaj jaroj troviĝas en la Kongresa Regularo kaj ĉiam sur la Aliĝilo, ke la lasta dato por aliĝo estas la 30a de junio. Antaŭe oni ne tre rigore aplikis tiun regulon, sed estas espereble ke L.K.K.-oj de nun observos ĝin. En Oslo oni aplikis ĝin kaj sekvis multe da plendado. L.K.K. eĉ en la lasta monato post la fina dato ricevis avizon pri du tutaj karavanoj pri kiuj ĝi antaŭe ne estis informita ! Ankaŭ tiel U.K. ne estas organizebla. La kongreso jam estas tiel granda kaj impona manifestacio, ke monato apenaŭ estas sufiĉa en kiu finordigi la lastajn detalojn kaj aktualigi la librotenadon.

La lastaj aliĝintoj kaj la tromalfruintoj havis preskaŭ la saman argumenton : oni ne sciis pli frue, ĉu aŭ ne eblos viziti la kongreson. Mi

volus sugesti, ke tiu argumento ne estas tre bona defendo de la malfrua aliĝo. Neniu el la fidelaj kaj lojalaj kongresanoj, kiuj jam en la fino de la antaŭa decembro pagis sian kotizon, povis scii kun absoluta certeco, ke ili venos aŭ ne venos. Efektive, 214 el tiuj kiuj pagis ne sukcesis atingi Oslon ! Ĝuste pro la frua aliĝo la organizado estas ebla, kaj tiuj, kiuj pro oportuneco lasas sian aliĝon ĝis la lasta momento, fakte ekspluatas la bonvolon de la fruaj aliĝintoj. La afero do havas moralan flankon. Cetere se oni aliĝas sed ne venas oni tamen ricevas ĉiujn kongresajn dokumentojn kaj oni havas la konscion, ke la kotizo estas konkreta kontribuo al la propagando de Esperanto.

La plej ofta plendo en Oslo estis pri loĝejaj prezoj. Multaj kongresanoj ne vidis rilaton inter la prezo anoncita en la dormĉambro kaj la prezo postulita de L.K.K. Iuj kongresanoj —mi intence ne uzas la vorton "samideano" — minacis venigi la policon al la akceptejo kaj tiel ĉantaĝe postulis repagon. La konduto en Oslo tiurilate estis tia, ke en la estonteco la formulado de la mendilo ŝajne devos esti sur jura bazo. Hontindaĵo por la movado !

Jen la simpla klarigo : (*a*) L.K.K. rezervigis litojn per trafika asocio al kiu ĝi devis pagi makleron, (*b*) la rezervado de litoj kaŭzas multe da korespondado, telefonado, vizitado, sekve iom grandajn elspezojn, (*c*) povas okazi (kaj en Oslo fakte okazis) deficitoj pro lastminutaj ŝanĝoj de prezoj. Mendita ĉambro ne estas disponebla kaj la hotelestro lokas la personon en plialtprezan ĉambron. Hoteloj ŝanĝas sian kategorion (en unu loko L.K.K. havis deficiton ĉar ne eblis komenci kolekti kelkajn kronojn de preskaŭ cent kongresanoj loĝantaj en tiu hotelo), (*d*) la prezo en la loĝejo ne inkludas la servmonon. En la plimulto de hoteloj tio estas 10% sed en kelkaj en Oslo ĝi estas 15%. La neta rezulto estas, ke L.K.K. aldonis procentaĵon por kovri ĉiujn eventualaĵojn. Tion normale faras trafikaj agentoj kaj neniu plendas. La meza aldono en Oslo finfine estis proks. 7½%. Tio ne estas ekspluatacо sed legitima ekonomia antaŭzorgo, kaj la sinteno de iuj kongresanoj estas des pli miriga, kiam oni pripensas, ke se restas ia profita saldo en la kongresa kaso, tio estas uzata nur por la propagando de Esperanto.

Verŝajne la plej granda ĝeno dum la kongresa jaro estas tio, ke tiel multaj kongresanoj skribas leterojn al L.K.K. anstataŭ simple plenigi la mendilon. Menciinde estas, ke la pli granda parto de tiuj ne sendas respondkuponon kvankam tiaj leteroj preskaŭ ĉiam postulas ian respondon. La leteroj tre ofte fontas en tio, ke la skribinto ne legis la instrukciojn donitajn.

La administra sistemo de U.K. estas bazita sur la kongresaj numeroj. Mi ne povas sufiĉe forte emfazi kaj peti, ke absolute ĉiu komunikaĵo al L.K.K. devas porti la koncernan kongresan numeron. Simpla subskribo de nomo devigas serĉadon kaj kontrolon ĉe la alfabeta registrilo.

Venas ĉiam petoj pri senpagaj kongresaj kartoj. L.K.K. estas komisiita de U.E.A. organizi la U.K. surbaze de la Statuto kaj de la Kongresa Regularo kaj laŭ tio ĝi **ne rajtas** doni senpagan aliĝon. Cetere la precedento estus tro danĝera. Ekzistas centoj da Esperantistoj, kiuj volus havi senpagan karton kaj

L.K.K. ne povas juĝi la meritojn aŭ pravecon de individuaj petoj.

Malgraŭ tio ke sur la kongresa karto estas presite, ke oni ne rajtas transdoni aŭ vendi la karton al aliulo, ĉiujare leviĝas problemoj pro ignoro de tiu regulo de U.E.A. La nombro de personoj kiuj petas repagon de la kotizo feliĉe malkreskas sed ofte estas malfacile konvinki samideanon, ke kvánkam la aliĝinto ne venas la sindevigoj de la L.K.K. restas. Eĉ se la tuta kongresanaro ne venus, oni tamen devus pagi pro la rezervoj kaj mendoj faritaj.

Kelkfoje aŭdiĝas la plendo, ke la kongresa kotizo estas tro alta. Necesas nur listigi la konkretajn redonojn de L.K.K. por refuti tiun plendon. La prelegoj de la Internacin Somera Universitato mem valoras la kotizon. Kiam oni pensas pri distra kaj arta vesperoj, pri kongresa balo, pri salonego por interkoniĝa vespero, pri la multaj salonoj disponigitaj senpage al la fakaj asocioj, pri la grandaj laboroj de la gazetara servo kaj ties elspezoj oni devas konfesi, ke la kotizo estas modera kaj ke la tuta aranĝo estas mirindaĵo de ekonomia administrado.

La suprajn vortojn oni ne rigardu kiel plendaron. La celo estas atentigi kongresanojn al malfacilaĵoj pri kiuj ili kredeble eĉ ne pensis, kaj montri al ili kiel ili povas mem helpi al la plena sukceso de estontaj kongresoj.

*daŭrigo* (*de p.* 304)

literoj formas konatan proverbon. Jen la signifoj de la vortoj : 1. paperoj, kiujn ĉiu esperantisto kun ĝojo ricevas ; 2. vestaĵo de speciala rajdanta militisto ; 3. ventodirekto ; 4. ŝtono, sur kiu oni legas la distancon de iu urbo ; 5. piediranta militisto ; 6. homo, kiu klopodas kapti plandirantan raban mamulon ; 7. vikario ; 8. esti en akordo ; 9. dubraka ilo por preni brulantan materion ; 10. rapida transportilo ; 11. homo, kiu faras objektojn por presi reliefan markon sur io ; 12. kolekto da frazoj, kiuj troviĝas en lingva lernolibro ; 13. aparato por averti kontraŭ danĝero ; 14. virino, kiu kapablas la rapidskribadon ; 15. viro, kiu alportas urĝan sciigon ; 16. unua transportilo por preskaŭ ĉiu homo ; 17. kun tio ordinare menuo komenciĝas ; 18. virino, kiu metie gardas etulojn ; 19. homo, kiu malhelpas miskomprenon pro malsamlingveco ; 20. homo, kiu pristudas la vivon de insektoj ; 21. fabriko, en kiu oni ĥemie plipurigas sukeron ; 22. homo, kiu havas la plej altan pozicion en iu urbo ; 23. pudro, farita el semoj, kiujn ordinare ĉevaloj manĝas ; 24. magazeno, en kiu oni povas aĉeti diversajn aferojn por prepari manĝaĵojn.




MAJSTROVERKO DE LA MONDLITERATURO

**IBSEN: PEER GYNT**

El la norvega tradukis E. A. Haugen

Prezo : bind. 15 ŝil., broŝ. 12ŝ. 6p., afranko 9p.

Eldonis : ELDONA RONDO,
Boks 178, Trondheim, Norvegujo

Mendu ĉe via librovendisto aŭ ĉe
U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo


# *Enigma Konkurso N-ro 72*


Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 28 rue Stuyvenbergh, Brussel II, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento.

Pliaj informoj, se deziratajˆ, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkupono internacia.

**Solvo de la enigmo N-ro 158 :** Esprimanta. Egala, Salmo, plaĉe, rango, itrio, maizo, arkeo, naŭzi, trupo, ardeo.

**Enigmo N-ro 162.** Sesangula enigmo. Ĉiu el la ses fakoj ĉirkaŭ numerita sesanguleto devas enhavi unu literon. Tiuj ses literoj formas vorton. Ĉe la klarigo de ĉiu vorto troviĝas interkrampe du literoj. La unua indikas (laŭ la apude presita sesanguleto) la fakon, en kiu komenciĝas la koncerna vorto ; la dua indikas la lokon de la dua litero de tiu vorto. La signifoj de la 19 vortoj estas : 1. Inflamo de la vejnaj parioj (FE) ; 2. Oficiala kapvesto (BA) ; 3. Gvidisto (BC) ; 4. Imagadi, kion oni forte deziras (FA) ; 5. Interhelpadi (DC) ; 6. Infaneto havas ĝin (DE) ; 7. Produktaĵo de polipoj el kio oni faras juvelojn (FE) ; 8. Timata krimulo (DC) ; 9. Peni fari ion en mallonga tempo (DE) ; 10. Spado (DC) ; 11. Legomo (BA) ; 12. Timego (FE) ; 13. Troviĝas en la buŝo (BC) ; 14. Tuto de kondutreguloj de ia aparta socio (DC) ; 15. Literatura verko (BA) ; 16. Ĝi donas nur pluveton (FE) ; 17. Eŭropano (BA); 18. Migrulo (FA) ; 19. Granda rivero (FA).




**Enigmo N-ro 163.** Silabenigmo.

a - a - a - an - bu - ci - co - co - ĉa - den - dis - do - duk - ek - eks - en - fa - faj - fan - fan - fi - fi - for - fos - gar - gi - go - gra - gra - gram - gres - ĝa - ĥes - in - in - in - in - is - is - jo - ĵo - ker - ki - ko - kon - kon - ku - lan - larm - le - lo - lo - lo - lo - lo - man - me - men - mo - mo - na - ne - ni - ni - no - no - no - no - no - no - nord - ok - pa - pil - por - pre - pre - pres - ra - ri - ri - ri - ris - ro - ro - ro - ru - sen - sis - so - so - spi - stam - ste - su - taŭ - te - te - ter - ter - ti - ti - ti - ti - tis - tis - tis - to - to - to - to - to - to - to - to - to - toj - tra - tro - tro - tu - tur - u - u - ur - va - var - ve - ven - vic - vu - zer.

El la supraj 132 silaboj formu 24 kunmetitajn vortojn, kies unuaj

*daŭrigo sur p.* 303

# *Internacia Somera Universitato*

## (Resumo de prelegoj faritaj en Oslo)

(La prelegoj de nia ISU vekas ĉiam pli grandan interesiĝon. En Oslo kelkajn el ili vizitis 500-600 personoj. Por ebligi al ĉiuj niaj legantoj konatiĝi kun ilia enhavo, ni publikïgas en tiu ĉi numero de nia revuo la *resumojn* de tiuj prelegoj. La legantoj estas atentigataj, ke la prelegoj de la unua laborperiodo (Malmö, 1948) estas publikigitaj en formo de libro kaj estas haveblaj de la libroservo de UEA. Espereble, kun la tempo estos sammaniere publikigitaj ankaŭ la prelegoj de la aliaj laborperiodoj.—*La Sekretario de ISU.*)

**Prof. D-ro Emil Smith, Oslo (Norvegujo) :**

# *La Naskiĝo de la Blanka Homo—*

## *la origino de la eŭropa kulturo*

EN la literaturo de la antaŭa jarcento oni ofte trovas la esprimon *La Blanka Homo* por la anoj de eŭropaj landoj kaj ties idoj en aliaj kontinentoj. La supereco, kiun ili arogis, paroligas la anglan verkiston Rudyard Kipling pri la *Ŝarĝo de la Blanka Homo.* Ankaŭ la ceteraj rasoj aŭ pli korekte la ceteraj popolgrupoj, estas nomataj laŭ siaj haŭtaj koloroj : la flava, bruna, ruĝa kaj nigra rasoj. Nun ni ne rigardas la haŭtan koloron kiel distingilon de la homaj rasoj.

Oni diras, ke la lingvo faras la nacion, sed tio estas tro malampleksa difino. La hindeŭropanoj estas niaj lingvaj prauloj. Ĉu ili ankaŭ estas niaj korpaj prapatroj ni ne scias. Kredeble ili jam estis miksaĵo de diversaj gentoj kaj elementoj. La opinio ke ili estis altaj kaj blondaj estas ĉiukaze sen fundamento. Kiam la prahindeŭropa lingvo originis ni ne scias, sed ĝi certe havas longan historion. La popol-migrado de la prahindeŭropanoj okazis ĝis la fino de la tria jarmilo antaŭkrista. Ni ne konas iliajn vivadon kaj kulturon per arkeologiaj trovaĵoj nek certe scias en kiu lando ili unue loĝis. Sed ni povas pli malpli rekonstrui ilian lingvon, kaj kie paroloj ekzistas, tie ankaŭ troviĝas aĵoj kaj aferoj.

La prahindeŭropanoj konis kelkajn metalojn : oro, arĝento kaj precipe kupro. Cetere ili utiligis armilojn kaj instrumentojn el ŝtono, osto, ligno k.t.p. Ili fabrikis potojn kaj vazojn kaj figuretojn el argilo, sed ili ne konis la potistan diskon. Oni kutime nomas tiun kulturepokon Kalkoŝtono aŭ ŝton-kupro-epoko.

La prahindeŭropanoj bredis la ordinarajn eŭropajn dombestojn kaj iomete kulturis la teron. Ili estis ĉasistoj, paŝtistoj, brutobredistoj kaj primitivaj agrikulturistoj. Ili bredis hundojn, bovojn, porkojn, ŝafojn kaj kredeble kaprojn, sed ili ne konis la katon. La plej eminenta dombesto estis la ĉevalo. Tamen ili ne rajdis sur ĝi, sed ĝin uzis kiel tirbeston antaŭ veturiloj. Tiuj moviĝis sur sledoj, parte sur kvar aŭ du radoj.

Por konduki siajn brutojn al konvenaj herbejoj, la hindeŭropaj paŝtistoj devis migri dum pluraj tagoj, eĉ semajnoj. Ili transportis siajn posedaĵojn kaj infanojn sur ĉaroj kaj loĝis en ledaj tendoj aŭ kabanoj plektitaj el vergoj.

Tiuj Nomadoj (daŭre sencele vagantaj) kaj Duonnomadoj (migradantaj inter neŝanĝaj vintra kaj somera hejmoj) vivadis familiope en klanoj, regataj de klanestroj. Ilin oni povus nomi *Ŝejkoj*, sed la hindeŭropa nomo verŝajne estis *reges*=reĝoj.

La terkulturista parto de la hindeŭropanoj vivadis po avo-familioj en siaj domoj kaj vilaĝoj. La familiestroj, la avoj, kunsidis por konsiliĝi kaj regis la genton. Ili ordinare havis prezidanton aŭ, precipe dum militoj, reĝon.

La hindeŭropa socio konsekvence estis dividita en multaj klasoj laŭ ia feŭdala reĝimo. La supra klaso konsistis el gentestroj, familiestroj kaj nobelaj bienestroj, la ceteraj klasoj el kamparanoj, paŝtistoj, laboristoj kaj servistoj.

Ni ne konas ekzakte la hejmon de la hindeŭropanoj. La ĉevaloj nature vivis sur herboriĉaj stepoj kaj antaŭ konstruo de veturiloj oni bezonis por la veturado platajn ebenojn ; tial fakuloj opinias, ke ĝi troviĝis en la steplando inter la Nigra Maro kaj Turkestano. Oni trovis en suda Ruslando, precipe en la norda Kaŭkazio ĉe rivero Kuban prahistoriajn tombaltaĵojn, t.n. *Kurganojn*. Ilia enhavo konformas kun tio, kion oni scias pri la prahindeŭropanoj. Oni eĉ vidas la bildon de ĉevalo sur arĝenta pokalo. Do la prahindeŭropanoj supozeble iam loĝis tie.

Post la mezo de la tria jarmilo antaŭkrista multaj triboj elmigris diversdirekton. Oni ne scias la kaŭzon, sed supozeble okazis granda senpluveco. Alia klarigo estas, ke la nombro de la loĝantoj troiĝis. Tio devigis iujn hindeŭropanojn forlasi sian hejmon kaj serĉi alian ejon, kie ili subjugigis la indiĝenan popolon, kiu ofte estis pli kulturita, sed malpli potenca ol la atakantoj. El tiuj kuniĝoj naskiĝis la Blanka Homo.

La unua historia sciigo pri la hindeŭropa popolo devenas el Malgrandazio komence de la dua jarmilo antaŭkrista. Tiutempe la popolo *Nitanni*, loĝante en la nuna Armenio, havis reĝojn kaj kredeble nobelaron. Ili havas hindeŭropajn iranlingvajn kaj irlandlingvajn nomojn ; eĉ iranlingvan lernolibron pri ĉevaldresado oni trovis !—Post mallonga tempo aperis en Malgrandazio alia hindeŭropa popolo, nome la *Hetitoj* kiuj fondis potencan ŝtaton kaj subigis multajn popolojn dum pli ol jarmilo. En la komenco de la dua jarmilo antaŭkrista la popolo *Hiksosoj* okupis Egiptujon, sed malmultaj el ili—se iuj ajn—estis hindeŭropanoj ; la plimulto estis Semidoj, eble kelkaj Hebreoj.

Samtempe ankaŭ la babela ŝtatego estis okupata de nordaj triboj, nome de la *Kasitoj*, sed ili ankaŭ, same kiel la Hiksosoj, estis nur antaŭgvardio de la hindeŭropanoj.

La plej gloraj triboj de la hindeŭropanoj estis la prapatroj de la grekoj. Ili invadis ĉirkaŭ du mil jarojn antaŭ Kristo kaj evoluigis valoran kulturon kiun oni nomas la Egea, Minoa aŭ Prakreta, ĉar la insulo Kreto fariĝis la centro de tiu kulturo. La prakretanoj estis kuraĝaj maristoj kaj spertaj komercistoj. Ili regis la maron per militŝipoj kaj importis kupron el Cipro kaj stanon el Hispanujo. Eksterlanden ili vendis oleon, vinon, vazojn, armilojn, instrumentojn, artaĵojn, juvelojn. Ili estis eminentaj teknikistoj kaj artistoj. Ili konis la skribarton, sed ni ne povas deĉifri kion ili postlasis. Ĉirkaŭ la mezo de la dua jarmilo antaŭkrista konkerantaj triboj el Greklando

invadis Kreton kaj finis la Minoan kulturon. Ĉar la okupantoj estis kredeble samnombraj kiel la enlandanoj, ili konservis sian hindeŭropan dialekton, kiu evoluis per influo de la enlanda idiomo al la greka lingvo. Ni ne scias de kie alvenis la hindeŭropanoj en Grekujon. Iuj opinias, ke ili migris laŭlonge de la Danubo tra Jugoslavio. Aliaj kontraŭdiras, ke la Pragrekoj enmigris el Malgrandazio. Tiu problemo ne jam solviĝis.

Dum la unuaj jarcentoj post la enmigrado la greka lando estis aro da gubernioj kaj kolonioj sub la estreco de la Prakretanoj. Sed iom post iom la nobelaj gentestroj kaj tribestroj fariĝis pli-malpli sendependaj. Post la mezo de la dua jarmilo antaŭ Kristo la princoj en Greklando fariĝis tute memstaraj. De tiu tempo ni nomas la prahistorian kulturon en Greklando la mikena. La Grekoj poste memoris tiujn reĝojn per mitoj kaj kantoj kaj dramoj. Dank' al Homero kaj aliaj grekaj poetoj, ni konas la grandan reĝon Agamemnon kaj Argoson, Menelaon, Aĥileon kaj Odiseon. La arkeologistoj ĵus trovis argilajn tabulojn plenskribitajn per tekstoj, kies literoj baldaŭ estos deĉifritaj.

Ankaŭ tiuj kulturo kaj potenco pereis, kiam la uzado de la fero kutimiĝis ĉirkaŭ la 12-a jarcento antaŭ Kristo; la demokrata epoko komenciĝis. Tamen la greka kulturo denove formiĝis per sia propra povo kun influo de orientaj gentoj, ekz. de la Fenikoj, kiuj donis al la Kretoj sian alfabeton, kiun tiuj plibonigis tiel ke ĝi fariĝis la pratipo de ĉiuj eŭropaj alfabetoj ĝis hodiaŭ. La unua eŭropa blanka homo naskiĝis kiam hindeŭropaj triboj enmigris Greklandon kaj intermiksiĝis kun la enlandanoj komence de la dua jarmilo postkrista, sed li kreskis dum la sekvaj jarcentoj kaj fariĝis matura viro en la tempo de sufero komence de la unua jarmilo.

Dum la Pragrekoj invadis en sian novan hejmlandon, aliaj hindeŭropaj triboj migradis okcidenten tra la valo de Danubo; inter ili la Praitaloj kaj la Prakeltoj estis la plej eminentaj. La itala lingvo dum multaj jarcentoj daŭradis esti internacia lingvo. Disciplino kaj disĉiplo estas karakterizaj Romanaj terminoj.

La Keltoj okupis grandajn partojn de la meza kaj okcidenta Eŭropo dum la unua jarmilo antaŭ Kristo, kaj ili estis tre talentaj kaj inteligentaj, sed senliteraturaj kaj malbonaj administrantoj. Tial iliaj regnoj malaperis preskaŭ sen postsignoj. Hodiaŭ oni parolas keltajn dialektojn nur en Irlando kaj en kelkaj distriktoj de Granda Britujo kaj Francujo. Sed granda parto de la okcidenteŭropaj enloĝantoj devenas de Keltoj kaj konservas iom da iliaj karaktero kaj pensmaniero.

La ĝermanaj triboj post la hindeŭropaj elmigradoj ekloĝis en la meza kaj norda partoj de Eŭropo. La romanidaj nacioj parte devenas de ĝermanaj prapatroj, parte de keltaj, parte de eŭropaj praenloĝantoj.

La Slavoj kaj la Baltoj ne envenis sur la scenejon de la historio antaŭ la mezepoko, sed ili konservas ankoraŭ nun multajn trajtojn de la hindeŭropa lingvo. Kredeble ili elmigris pli malfrue el la origina hejmlando.

* * *

Per tiu malgranda resuma raporto pri hindeŭropaj triboj kaj nacioj mi kredeble montris, ke rasoj signifas preskaŭ nenion. La lingvoj kaj la kulturoj

kunigas kaj disigas la homojn. La Blanka Homo estas ludinta gravan rolon en la dramo de la historio post sia naskiĝo, sed nun li estas mortanta. Mi ne kalkulas plu je diverskoloraj rasoj, sed mi esperas je la saĝa homo *homo sapiens*, la supernacia, la bonvolema, la humana homo.

**Rankajo Ch. Datoe Toemenggoeng, Djakarta (Indonezio) :**

# *La socia pozicio de la virino en Indonezio*

PAROLANTE pri la Indonezia virino mi povas preni nur kelkajn faktojn el la abunda materialo kaj por doni al vi klaran bildon, mi dividos nian virinan mondon en tri tavolojn : la virino en la deso (kamparo), la duonklera virino kaj la intelektulino.

La unua kaj plej granda grupo loĝas en la kamparo kaj plenumas siajn devojn en la domo kaj sur la kampo. Ĝi estas la firma spino de la aliaj du grupoj, ĉar Indonezio estas agrikultura lando. La instruado de la intelektuloj ebliĝas nur per la fervora laboro de la patrinoj, kiuj vivas en la fermita mondo de la kamparo.

Ofte oni aŭdis en antaŭaj tempoj, ke la desa virino ŝatas nur trankvilon kaj ordon, ke ŝi estas kontenta, se ŝi havas sufiĉan manĝaĵon kaj bonan loĝejon. Tio ne estas ĝusta. Certe ŝi ŝatas ordon pli ol malordon, sed tio ne signifas, ke ŝi ne interesiĝas pri tio, kio okazas ĉirkaŭ ŝi. Diligente ŝi vizitas kursojn por pliriĉigi siajn sciojn kaj spertojn.

Kvankam oficiale kaj ekstere la viro estas la reprezentanto, la virino havas grandan influon kaj oni alte taksas ŝian opinion.

Ekzistas regiono en la mezo de Sumatro, nomita Minangkabaŭ, kie la virino havas pozicion, pro kiu ĉiuj virinoj en la tuta mondo verŝajne envias ŝin.

La patrino estas la kerno de la tuta socio, ŝi plene regas, administras la familian kapitalon kaj decidas pri la familiaj aferoj.

*La koko ne metas la ovojn*—tio esprimas, ke la infanoj estas plena posedaĵo de la patrino kaj de la familio de tiu patrino, do de ŝiaj gefratoj. La patro havas nenion komunan kun ili kaj la infanoj ankaŭ ricevas la familian nomon de la patrino. Ŝi kaj ŝia familio havas la devon prizorgi ĉi tiujn infanojn, dum la patro devas prizorgi la infanojn de sia familio.

Se la Minangkabaŭ-a virino edziniĝas, ŝi celas precipe al nasko de infanoj por daŭrigi sian genton kaj igi ĝin honorplena kaj digna. Tial estas ŝi kiu elektas la viron, kiun ŝi opinias inda esti la patro de siaj infanoj kaj ŝi faras edziĝopeton al la viro. Ofte ŝi devas multon pagi por ekposedi la deziraton edzon aŭ bofilon, kiu devas esti kiel eble plej sana kaj bondevena.

Post la geedziĝo, la edzo ekloĝas ĉe sia edzino kaj de tiu momento li estas la honorata gasto en la domo. Atentu bone, li estas gasto kaj gasto ne rajtas ekspluati la gastamon. Li tuj elektas modestan angulon por si, sed ne restadas la tutan tagon en la gastama domo. Matene li iras hejmen al la hejmo de sia patrino kaj portas kun si pakaĵeton de lavotaj aŭ flikotaj vestaĵoj. Ne venas al li la ideo ŝarĝi per tio sian gastigantinon.

La romantiko inter edzo kaj edzino ĉiam konserviĝas, verŝajne ĉar neniam venas sub la okulojn de la edzino la malpura lavaĵo de la edzo! Tiele, Minankabaŭ-aj geedzoj plej ofte restas kune 50 aŭ 60 jarojn, trankvile kaj kviete sen montrado de flama amo aŭ enamiĝo, sed kun la plej alta reciproka estimo.

Kompreneble, jen kaj jen povas ekesti malfacilaĵoj, kiuj povas kaŭzi rompon, sed plej ofte tio okazas en la intereso de la familio. Povas esti, ke laŭ la opinio de la familio la edzo malbone kondutas aŭ ke la vizaĝo de la edzo ne plu plaĉas al la familio. Tiam oni komprenigas al li, ke li preparu sian foriron. Kaj **ŝi** restas ankaŭ kiel eksedzino sur la loko, kiu estas la ŝia kaj, finance sendependa, ŝi ne bezonas kalkuli je aliaj sed nur je propraj forto kaj iniciato.

La okcidenta virino tuj sin demandas: Kiun rolon ludas la persona feliĉo de la Minangkabaŭ-a virino? Nu, mi kiu mem estas Minangkabaŭ-a, povas diri, ke ŝi estas kontenta, kiam la familio, al kiu ŝi apartenas, ne havas kialon por plendi. La ideo ne venas al ŝi fari ĥaoson en orda socio de centoj da jaroj nur pro intereso de sia propra eta persono. Ŝian pozicion neniu povas kadukigi kaj nenia emacipiĝo povas anstataŭigi ĝin per io pli bone.

Mi ankoraŭfoje atentigas vin, ke tiu ĉi antikva tradicio ekzistas nur en malgranda parto de Indonezio, nome en meza Sumatro.

Mi nun rekondukos vin al la Indonezia virino ĝenerale, la virino kiel libera civitano en sendependa Indonezio. Ĵus mi priskribis la pozicion de la kampara virino. Nun mi rakontos ion pri la dua grupo, la duonklera virino, kies horizonto estas pli larĝa pro lerneja instruo. Ŝi estas la plej fervora kaj diligenta instruantino en la kamparo kaj ŝi klerigas sian malpli privilegiitajn fratinojn. Estas ŝi, kiu efektivigas la idealojn de la intelektuloj.

Fine mi venas al la plej alta tavolo, la intelektuloj, malgranda kuraĝa grupo, kiu estas la portanto de la estonteco, ĉar ĝi havas en si la ĝermojn de juna kaj forta Indonezio. Sur ĝi apogas sin la emancipiĝo, kiu ĉerpas forton el ĝi. Per sia klereco, la virino de tiu grupo havas pli vastajn perspektivojn, povas rekoni maljustaĵojn kaj ricevas pli profundan komprenon pri sociaj okazaĵoj. Estis R. A. Kartini, kiu antaŭ 60 jaroj iniciatis la novan virinan movadon. Per la evoluo de spirito kaj menso la virino nun pli taŭgas por la edukado de siaj infanoj, ŝi iĝis inda kamarado de sia edzo kaj precipe ŝi iĝis grava ĉenero en la lukto por justeco kaj ĝusteco. Estis feliĉo por ŝi, ke ŝi travivis benoplenan tempon, kiu ebligis al ŝi aktivan partoprenon en la sociaj okazaĵoj. Estas beno, ke subite multaj vojoj, kiujn ŝi povas iri sendepende kaj laŭ propra karaktero, estas malfermitaj al ŝi.

La virino kiel instruistino, pentristino, kuracistino, juristino, kiel flegistino ĉe la litoj de malsanuloj kaj vunditoj, sur la podiumo alparolante la amason, kun fotoaparato kiel ĵurnalfotografisto, en improvizita kuirejo meze de la batalo, virino kiel ministro, kiel parlamentano—jen momentbildoj de la hodiaŭa virino en Indonezio.

La Indonezia virina movado havas socian-nacian karakteron. Ĝia strebado ĉiam estis akiri porteblan sorton por subpremitoj kaj humiligitoj. Oni celis pli da instruado, plibonigon de la maljustaĵoj, plibonigon de la

higienaj kaj medicinaj prizorgoj. Oni fondis unuiĝojn por kontraŭbatali la analfabetismon, infangeedziĝojn, negocon pri virinoj kaj infanoj k.t.p. Kvankam la indonezia virino antaŭ la sendependeco jam bone progresis kaj multe konstruis ankaŭ en kunlaboro kun la nederlandaj virinoj, tamen ŝi spertis en sia laboro multajn malfacilaĵojn. Multe oni malaprobis ŝin, kiam la movado iĝis tre naciisme direktita. Tre facile oni antaŭe kvalifikis patrioton kiel "Nederland-malamanton". Jes, oni tre timis la vorton "naciismo", dum ĝi tamen nur esprimas la sentojn, kiujn havas ĉiu, ne malplej multe la nederlanda virino, por siaj popolo kaj patrolando. Patriotismo ja havas nenion komunan kun maltrankviligo kaj milito, sed ĝi estas nur la deziro aparteni al nacio kaj disponi pri propra kulturo. Neniu malfidu ĉi tiu deziron, kaj se oni restas reala, ĝi neniam deflankiĝos al io alia. La indonezia virino **estas** reala, kaj malgraŭ la emancipiĝo ŝi ĉiam okupas tipe virinan lokon.

Ŝi ĉiam restos la simbolo de la patrino, same simpla kaj grandeca kiel la patrino de ni ĉiuj, la "tero", la ĉiam pacienca, la fekunda, la zorganta.

**Prof. D-ro W. E. Collinson, Liverpool (Britujo) :**

# *Klasigado de lingvoj kaj la loko de Esperanto inter ili*

ONI klasigas lingvojn laŭ du vidpunktoj : (1) oni sekvas la evoluadon de lingvo reen ĝis en la plej fruaj epokoj kaj provas rekonstrui la praformon kaj la historian parencecon de lingvoj ; (2) oni pristudas kaj priskribas la aktualan strukturon de lingvo ĉe difinita tempopunkto. Per (1) oni starigas lingvo-familiojn, ekz. la hind-europan, ugra-finan, semidan. Post ĉiuj esploroj, multaj lingvoj ne povos kungrupiĝi. Tamen, mankas la donitaĵoj por aserti, ke la homa lingvo originis diversloke. Ĉiuokaze la origino troviĝas en ne plu esplorebla prahistoria epoko.

Lastatempe la lingvuloj dediĉis multe da tempo al strukturaj problemoj, precipe la nederlandano de Groot en sia *Strukturele Syntaxis* kaj pluraj usonanoj, kiuj multe profitas per la studoj de amerikaj lingvoj, ĝis tiam ne taŭge analizitaj. La du ĉefaj vidpunktoj por klasigado de lingvaj strukturoj estas (*a*) la "morfoligo", inkluzive de vortfarado, kaj (*b*) la "sintakso", kiu ampleksas la vortgrupigon kaj frazkonstruadon. Ekzistas skalo de integreco, kiu etendiĝas de lingvoj, kiuj havas nur plenvortojn aŭ "liberajn formojn" kaj tute malhavas finaĵojn aŭ aliajn modifilojn, ĝis lingvoj en kiuj la limoj inter eraj vortoj kaj frazoj estas preskaŭ forviŝitaj.

La procedoj, kiujn uzas lingvoj por formi vortojn kaj interrilatigi ilin gramatike estas treege diversaj. Ofte sufiĉas ekz. la apudmeto de vortoj en difinita ordo. Multaj lingvoj formas kunmetaĵojn per la kombino de plenvortoj. Aliaj preferas afiksadon, ĉu per sufiksoj post la radiko, ĉu per prefiksoj antaŭ la radiko, ĉu—kiel ekz. kelkaj orientaj lingvoj kiaj la munda-paroloj de Hindujo aŭ tagaloj de la Filipinoj—per enfikso en la radiko mem.

Kelkaj lingvoj faras grandan uzon de interna modifo, ekz. la araba kaj hebrea, kiuj havas trikonsonantajn radikokadrojn kiel k-t-b "skrib-", en kiun oni povas meti diversajn vokalojn (katib, kitab, kutub ktp.) La "bantu" lingvoj renversas nian eŭropan fleksiadon, metante la fleksion antaŭ la radikon (kp. germ. *ge-kommen*=veninta), ekz. mu-rtu signifas "homo" kaj ba-rtu "homoj". Fine oni konstatas, ke multaj lingvoj uzas prozodiajn rimedojn, kiel la fortakcenton, la silabtonon aŭ gruptonon kaj la intermeton aŭ nuligon de paŭzoj por distingi vortseriojn aŭ sintaksajn konstruaĵojn.

Unuflanke de la skalo estas la ĉina, kiu maksimume uzas la principojn de izoleco (apudmeto en difinita ordo de plenvortoj) kaj analizeco (helpvortoj anstataŭ modifoj). La polineziaj lingvoj uzas kelkajn afiksojn en vortfarado, sed ne multe modifas la vortojn por gramatikaj celoj. (Parenteze: la nuntempa angla lingvo emas al tiu stato !) Lingvoj, kiuj alĉenas al la radiko tutan serion da afiksoj (precipe sufiksoj), kiel la finna kaj turka, ofte nomiĝas "aglutinaj" kaj kelkaj pretendis, ke Esperanto estas tia lingvo, sed fakte ĝi estas nur tre malforte aglutinema kaj similas multrilate al la hind-eŭropaj tipoj. Kompleksajn frazvortojn kun enkorpigo de objektoj kaj kvalifikoj faras la baskaj dialektoj, multaj kaŭkazaj lingvoj kaj nordamerikaj inkl. de la eskima.

Esperanto estas tre utila komparilo kaj analizilo por klare elmontri la diversajn lingvo-tipojn.

**Prof. W. H. Harris, Lampeter (Britujo) :**

# *Le keltaj popoloj kaj lingvoj*

## *Keltaj popoloj*

LA antikvaj keltoj okupis centran Eŭropon. Dum la unua miljaro antaŭ Kristo ili enmigris Britujon kaj Irlandon. Post la disiĝo de la Roma Imperio ili ekaperis kiel ses apartaj popoloj en ses landpartoj :

| | | | |
|---|---|---|---|
| (1) Alba : | Skotlando | (4) Cymru : | Kimrujo |
| (2) Eire : | Irlando | (5) Kernow : | Kernovo |
| (3) Mannin : | Mann-insulo | (6) Breizh : | Bretonujo. |

Post historia resumo de ilia sendependa periodo sekvis la "*Kelta literaturo*", nome : (1) la heroa poezio, (2) la antikvaj sageoj, (3) la romancoj pri "Arturo kaj liaj kavaliroj de la ronda tablo", kiuj fariĝis "internaciaj".

## *La keltaj lingvoj*

Unu el la grupoj de Hindo-Eŭropaj lingvoj estas la keltaj lingvoj. Ili havas du branĉojn : Gojdela kaj Britona.

I. *Gojdelaj :* (1) Gaedhilge : Irlanda
(2) Gaedhilg Albanaigh : Gaela
(3) Gaelek Manninagh : Mannlingva

II. *Britonaj :* (1) Cymraeg : Kimra
(2) Kernewek : Kernova
(3) Brezhonek : Bretona.

Post priskribo de kelkaj karakterizaj ecoj de tiuj lingvoj la prelego finiĝis per raporto pri la "nuntempa stato". Kvar el la lingvoj vivas aŭ reviviĝis, speciale la Irlanda, Kimra kaj Bretona. Sed la estonteco ne estas certa pro la deviga supereco de la Angla kaj Franca. La angla registaro permesas la laŭvolan instruon de la Kimra. La franca registaro ne permesas la instruon de la Bretona. La irlanda registaro kuraĝigas la instruon de la Irlanda.

Estas prokeltaj movadoj kaj ĉiujaraj festoj patriotaj, k.e. la kimra "Eisteddfod", tutsemajna afero kiu altiras 100.000 homojn. Estas i.a. "Kelta kongreso" ĉiujare, kie oni pritraktas keltajn aferojn, pro manko de komuna lingvo, en la angla lingvo. Tie oni revis pri ia "komunkelta interlingvo", sed oni malatentas la Internacian Lingvon, kiu solvus la problemon.

**Rektoro Karl Söderberg, Uppsala (Svedujo) :**

# *La popola altlernejo—skandinava kontribuo al kleriga laboro*

LA iniciatinto de la unuaj popolaltlernejoj estis la dano N. F. S. Grundtvig, sed li mem nek fondis tian lernejon nek agadis kiel instruisto. Tamen la popolaltlernejo estas rezulto de liaj ideoj pri la popolklerigo, propagandaj ek de la 1830-aj jaroj. Li ne prezentis sisteme ellaboritan laborprogramon, sed li ofte revenis al certaj fundamentaj ideoj, kaj sur ili ankoraŭ baziĝas la popolaltlernejo. Unue temis pri lernejo por plenkreskaj gejunuloj, ĉar je la aĝo de 17-20 jaroj la homo ekkonscias pri si mem, demandas pri la celo de la ekzistado kaj provas klarigi al si sian propran vivotaskon. La ĉefa tasko de la instruado devas esti ne nur perado de scioj, sed lumigo de la vojo al propra vivkoncepto. La popolaltlernejo devas gardi la nacian kulturon kaj la popolajn tradiciojn, kaj el tio sekvas, ke historio, lingvo kaj literaturo de la gepatra lando okupas elstaran lokon en la lerneja programo laŭ Grundtvig. Fine, li opiniis, ke la plej esenca formo de instruado estas la parolo, la buŝa vorto, kaj ne la libro, nek la leciono aŭ la ekzameno.

La granda ĝenerala popoluniversitato por Danujo, pri kiu Grundtvig revis, neniam realiĝis, sed baldaŭ entuziasmaj viroj, kiujn vekis kaj instigis liaj ideoj, komencis fondi malpli grandajn popolaltlernejojn. La unua estis fondita en 1844 en la Norda Ŝlesvigo kiel defendo de la dana patriotismo en tiu limregiono, kaj pluraj sekvis en rapida takto. Iom post iom la popolaltlernejo enmigris ankaŭ en la aliajn nordajn landojn : en Norvegujon en 1864, en Svedlandon en 1868 kaj en Finnlandon en 1889. Energiaj klopodoj estis faritaj transplanti la popolaltlernejon ankaŭ ekster la skandinava kultura sfero, sed nenie ĝi enradikiĝis tiagrade, ke ĝi fariĝis vere notinda trajto en la kultura fizionomio de la koncerna lando.

La du ĉefaj elementoj de la unuaj **norvegaj** popolaltlernejoj estis la Grundtviganismo kaj la kampula romantiko, sed ili ne povis evolui trankvile sen kontraŭstaro. Okazis ke kontraŭuloj eĉ starigis kaj subtenis aliajn lernejojn. Sekve de tiu kontraŭstaro la norvegaj pioniroj devis tre forte kaj akre batali por siaj ideoj kaj idealoj, kaj multaj el ili estis devigataj rezignacii. Baldaŭ tamen elkreskis nova gejunulara movado, kiu efike apogis la starigon de tiaj kulturcentroj multloke en la lando, kaj por la lasta generacio la norvega popolaltlernejo estis forta kaj instiga fermento en la kleriga laboro.

En **Svedlando** la unuaj popolaltlernejoj fakte ekstaris sen iu rekta influo de Danujo, sed ilia evoluo tamen estis tre paralela kun la danaj antaŭuloj. Ili estis la fruktoj de du iniciatoj. Unu venis el rondo de universitate instruitaj liberaluloj, kiuj estis samtempe fervoraj patriotoj kaj anoj de la skandinavisma movado. La duan iniciaton prenis kamparanoj en la sudsveda provinco Skanio, kaj tio rilatas al la nova civitana stato de la svedaj kampuloj ek de la 1860-aj jaroj dank' al novaj leĝoj, laŭ kiuj la kamparanoj unuflanke ricevis la rajton mem decidi pri siaj propraj lokaj aferoj kaj aliflanke ekhavis la eblecon sendi reprezentantojn al la reorganizita duĉambra parlamento. Kiam la kamparanoj akiris tian potencon kaj tian influon, ili samtempe sentis bezonon de pli bonaj scioj ol ili ricevis en la elementa deviga lernejo.

Ankaŭ la **finnlanda** popolaltlernejo montras la saman sintezon de nacia karaktero kaj unueca nordlanda fundamento, kaj tio pruvas, ke Finnlando kiel tuto apartenas al la skandinava kulturregiono kaj ke lingva parenceco ne estas senkondiĉa interligilo.

Kiel, eble, neniu alia kultura aperaĵo, la popolaltlernejo do estas vere nordlanda kultura produkto. Sed spite de la fakto, ke tiuj lernejoj elkreskis kaj evoluis el pure nordlanda grundo kaj ke ili ĉiam fervore klopodis aktivigi la intereson pri nordlandaj problemoj, ili montris notindan intereson pri internaciaj aferoj, kaj precipe dum la lastaj jardekoj la studado de interpopolaj rilatoj okupis tre elstaran lokon en iliaj kursplanoj.

La instruado en la popolaltlernejoj sufiĉe multe varias dank' al la granda libereco rilate al fiksitaj studplanoj, depende de la personeco de la rektoroj kaj instruistoj kaj laŭ la interligiteco de la koncerna lernejo al certa idealisma movado. Sed principe ĉiuj lernejoj havas la saman celon, nome doni al plenkreskaj gejunuloj ĝeneralan kaj civitanan kleron kaj veki ilin al persona pensovivo. Tiucele la lernantoj devas speciale studi sian landon kaj sian hejman provincon el historia kaj socia vidpunktoj. Krome ili devas akiri praktikajn konojn, per kiuj ili povos pli bone plenumi sian profesian laboron kaj siajn devojn kiel civitanoj en demokrata ŝtato.

Dum la kursoj—ordinare kvin monatojn en vintra kurso kaj tri monatojn en somera kurso—la lernantoj loĝas en la lernejo, ĉiutage manĝas kune kun siaj instruistoj kaj ankaŭ pasigas la plej grandan parton de sia libera tempo kune kun ili. Krom la laŭskemaj lecionoj, prelegoj kaj diskutoj, regule okazas diversspeca kunestado, studrondoj pri libervolaj temoj, studekskursoj k.t.p.

Ek de la dua duono de la pasinta jarcento idealismaj popolmovadoj esence kunhelpis al la disvolviĝo de tiu libera socia reĝimo, kiu ja de longe

karakterizas la nordajn ŝtatojn. Sufiĉe frue ili ekkontaktis kun la popolaltlernejoj kaj eĉ fondis proprajn tiajn instituciojn, kiuj tamen ne estas propagandaj centroj de iuj ideoj kaj kiuj sekve akceptas ankaŭ disĉiplojn, kiuj ne apartenas al la koncerna movado.

Malgraŭ la diversaj pli malpli grandaj diferencoj inter la pli ol 200 popolaltlernejoj en la nordaj landoj, oni povas resume konstati, ke ili ĉiuj reprezentas kaj aplikas la samajn kulturajn ideojn kaj principojn. Iliaj plej esencaj ecoj estas, ke ili sin turnas al kleravidaj plenkreskuloj, ke ili celas doni ne difinitan kvanton da scioj, sed lumigon pri la vivo kaj helpon al anima orientiĝo, ke ili en sia instruado en pli alta grado ol aliaj lernejoj uzas la parolon, kaj ke ili kiel eble plej multe provas fari la lernejan vivon familia kunestado, en kiu home altvaloraj fortoj povas libere efiki kaj en kiu komuna laboro kaj komuna kantado levas kaj kunigas la homojn. Kaj en ĉio tio ni danke rekonas la heredaĵon de la dana popolaltlernejo.

**Prof. D-ro Ivo Lapenna, Londono (Britujo) :**

# *Genocido—Nova Kategorio de Internacia Krimo*

LA krimoj, faritaj dum la pasinta milito, transpasis ĉion, kion eĉ la plej riĉa fantazio povis imagi. Oni ne nur mortigis homojn. Oni mortigadis ilin sisteme, vere science. Grandaj hombuĉejoj kreiĝis ĉie tra Eŭropo. Milionoj da senkulpaj estuloj perdis sian vivon en plej teruraj suferoj. Ion, almenaŭ ion oni devis fari por puni la krimulojn.

Fakte, la 8-an de Aŭgusto 1945, la kvar grandaj aliancanoj subskribis Kontrakton pri la Persekutado kaj Punado de la Ĉefaj Militkrimuloj. Al la Kontrakto estis aldonita la Statuto de la Internacia Milittribunalo.

Laŭ la aktoj de la 8-a de Aŭgusto, al kiuj poste aliĝis ankaŭ aliaj ŝtatoj, ekzistas tri kategorioj de internacia krimo : (*a*) krimoj kontraŭ la paco (ekzemple : planado, preparado aŭ instigado al agreso* kaj la agreso mem), (*b*) krimoj kontraŭ la leĝoj kaj kutimoj de la milito (ekzemple : mortigo; turmentado, sendado al devigaj laboroj, rabado de privata aŭ publika havaĵo, superflua detruado de urboj) ; (*c*) krimoj kontraŭ la homeco (ekzemple : mortigo, ekstermado, sklavigo, aŭ disleĝigo de la civila loĝantaro). Estas akcentinde, ke ĉiu el la menciitaj agoj, por ke ĝi estu konsiderata kiel krima, devas esti iamaniere ligita al la agreso. Tial—ĉiam laŭ la atkoj de la 8-a de Aŭgusto—ekstermado de iu nacia, rasa aŭ religia grupo, se tiu ekstermado ne estis ligita al preparado de la agreso, ne povis esti konsiderata kiel internacia krimo.

Tio estis grava manko en la aktoj de la 8-a de Aŭgusto. La konscienco de la homaro ribelis kaj konsideris ankaŭ tiujn fiagojn kiel la plej grandajn krimojn. Temas pri detruado de tuta rasa, nacia aŭ religia homgrupo. Tial oni nomis tiun krimon "genocido", kio signifas "gentomurdo".

Evidente, ankaŭ la genocido konsistas el mortigado de homoj, sed estus granda eraro pensi, ke genocido estas krimo kontraŭ individua homo.

* = atakmilito

Kvankam la genocido esprimiĝas en detruado de unuopaj homoj en amasaj kvantoj, tamen ĝia celo ne estas detrui unuopan personon. La genocido celas al detruo de tuta nacio, de tuta raso, aŭ de tuta religia grupo, precipe se la religio estas apartaĵo de la grupo, se ĝi konsistigas distingilon de la grupo. La detruado de la unuopaj personoj estas nur rimedo por atingo de tiu ĉefa celo. Inter la murdisto en la ordinara senco de la vortoj kaj lia viktimo ĉiam ekzistas ia persona konflikto. Male, la faranto de genocido havas nenian personan kontakton kun siaj multnombraj, milionaj viktimoj.

La krimo de genocido povas esti farata laŭ diversaj manieroj :

*La fizika genocido* estas rekta amasa mortigado de apartenantoj al iu rasa, nacia aŭ religia grupo ;

*La biologia genocido* estas farata tiel, ke oni malebligas la naskiĝojn en la rasa, nacia aŭ religia grupo per steriligo (senfruktigo) de la grupomembroj, per malpermeso de geedziĝoj, per la fakta disigo de la seksoj kaj per devigaj abortoj, se la koncipiĝo jam okazis ;

*La kultura genocido* konsistas el senigo de ĉiuj eblecoj por kultura evoluo de la koncerna grupo, precipe per malpermeso de la nacia lingvo, detruo de la literaturo kaj aliaj kulturaj valoroj de la koncerna grupo.

Laŭ la projekto de la ĝenerala konvencio pri genocido, kiu estis akceptita de la Unuiĝintaj Nacioj la 9-an de Decembro 1948, la genocido estas krimo de internacia juro. Ĝi povas esti farita en tempo de paco aŭ en tempo de milito. La ŝtatoj kiuj ratifas la Konvencion, devigas sin malhelpi tiun krimon, persekuti kaj puni la krimulojn. La objekto de genocido estas nacia, etnika, rasa aŭ religia grupo. Aliaj grupoj—ekzemple politikaj, ekonomiaj aŭ similaj—ne estas protektataj de la Konvencio. Granda diskuto estis precipe pri la politikaj grupoj. Fine oni decidis, ke tiuj grupoj ne povas esti protektataj per tiaspeca konvencio, ĉar ili ne estas sufiĉe stabilaj, nek ili havas sufiĉe klarajn karakterizajn trajtojn. Aliflanke, oni enmetis la vorton "etnika", kiu enhavas la ideon de ankoraŭ neformiĝinta nacio. Temas pri grupoj, kiuj havas elementojn de nacio, sed ĉe kiuj la nacia konscio ankoraŭ ne formiĝis.

La Konvencio konsideras kiel genocidon jenajn agojn : (*a*) mortigo de la membroj de la grupo ; (*b*) kaŭzado de gravaj fizikaj aŭ mensaj kripligoj al la membroj de la grupo ; (*c*) altrudado al la grupo de tiaj vivkondiĉoj, kiuj havas kiel konsekvencon ĝian plenan aŭ partan fizikan detruon ; (*d*) altrudado de mezuroj kun la celo malebligi naskiĝojn en la kadroj de la grupo ; (*e*) perforta transigo de infanoj for de la grupo al alia grupo.

Kiel oni vidas, tia difino de genocido ampleksas la fizikan genocidon kaj la biologian genocidon, sed ne la kulturan. Fakte, kriminale-juran protekton bezonas nur la fizika kaj biologia genocido, dum la kultura genocido apartenas al la sfero de ĝenerala jura de naciaj malplimultoj.

Pro la fakto, ke tiun krimon kutime povas fari nur la personoj, kiuj tenas en siaj manoj la ŝtatan potencon utiligante por tiu celo la ŝtatan aparaton, la Konvencio tute prave preskribas, ke eĉ la plej altaj pozicioj en la ŝtata hierarkio ne liberigas la farintojn de tiu krimo de la kriminala respondeco.

Konsiderante ĝuste tiun ĉi fakton, oni povis atendi, ke la kompetenteco por juĝado de tiu krimo estos transdonita al iu internacia instanco. Bedaŭrinde, pro la forta kontraŭstaro de kelkaj ŝtatoj, la fina teksto de la Konvencio antaŭvidas, ke tiu gravega krimo estos juĝata de la internaj ŝtataj tribunaloj. Tial la nuna protekto de tiuj homaj grupoj estas treega manka. Vere, ne estas imagebla tribunalo, kiu kuraĝus juĝi kaj puni la ĉefojn de sia propra ŝtato, kulpajn pro farita genocido. Ekzistas nur tute malgranda ebleco de internacia kontrolo pere de la Internacia Kortumo en Hago, kiu estas kompetenta juĝi ĉiujn konfliktojn inter la ŝtatoj-membroj de la Konvencio, rilate la interpretadon, aplikadon aŭ korektan plenumadon de la Konvencio. En tiu okazo estas ebleco eĉ por apliko de devigaj rimedoj kontraŭ la ŝtato, kiu ne obeus la regulojn de la Konvencio.

Estas nia devo, en la intereso de ni mem kaj en la intereso de la homaro kiel tuto, konatiĝi bone kun ĉiu eĉ la plej eta progreseto farata sur tiu kampo, subteni morale tiun evoluon, konscii ke de nia apogo al tiuj tendencoj multe dependas la efektivigo en la praktiko de la solene proklamitaj novaj principoj kaj reguloj de la internacia juro.

**Muzea kuratoro C. Støp-Bowitz, Oslo (Norvegujo) :**

# *La Lumbriko — la senlaca helpanto de la terkulturistoj*

LA lumbriko apartenas al la granda bestgrupo nomata "vermoj", pli precize al la anelidoj aŭ artikvermoj. Ĝia tuta korpo konsistas el multaj mallongaj artikoj ; sur ĉiu el ili troviĝas 8 mallongaj fortikaj haregoj aŭ ĥetoj ; la buŝon oni trovas ĉe la pinta antaŭaĵo, kaj super ĝi troviĝas malgranda, rondeca "kapeto", kiu servas kiel speco de supra lipo. La tuta korpo estas kovrita de maldika haŭto, sub kiu troviĝas tavolo da muskoloj, kiu faras la bestojn tre moviĝ-kapablaj. La lumbriko havas bone evoluintajn sango- kaj nervo-sistemojn.

En Norvegujo la lumbrikoj povas atingi longon de 20-30 cm., sed en pli sudaj landoj, ekzemple Aŭstralio, ili gigante longaj troviĝas : 3, 4–5 m. kaj estas dikaj kiel homa brako ! La hejmo de la lumbriko estas la humo, kie ĝi povas moviĝi sufiĉe rapide. Ĝi fosas sian vojon, borante sian pintan antaŭaĵon tra la tero, poste ĝi plivastigas la antaŭaĵon tiel, ke la terpartikloj estas puŝataj flanken, kaj firmigataj per malhela substanco, tiel ke la kanaloj malpli facile kunfalu. La bestoj ofte uzas la saman kanalon dum longa tempo. Ofte la vegetaĵoj rekte utiligas la lumbrikajn kanalojn, kreskigante siajn radikojn malsupren tra ili. La kanalo finiĝas malsupre en malgranda ĉambreto aŭ kavaĵo, tegita per ŝtonetoj aŭ semoj, kaj tie kuŝas vintre aŭ dum seka tempo unu aŭ pluraj lumbrikoj. La nutraĵo de la lumbriko estas ĉiaj organikaj substancoj, restaĵoj de vegetaĵoj kaj animaloj, kiujn ĝi eltiras el la humo trapasanta tra ĝia intesto. Ĉe tio la tero estas objekto de ĥemiaj ŝanĝoj : se la tero estas tro acida, ĝi fariĝas malpli acida, pasante tra la vermo;

se ĝi estas tro alkala, ĝi malpli alkaliĝas. La lumbriko do kreas preskaŭ neŭtralan humon, riĉan je vegetaĵa nutraĵo dissolvebla en akvo. La agado de la lumbriko faras la teron maldensa, pororiĉa, tiel ke la aerumado en la tero multe pliboniĝas. Eksperimentoj montris ke vegetaĵoj, kiuj kreskas sur tero kun lumbrikoj, liveras 20–100% pli grandan rikolton ol vegetaĵoj kreskantaj sur senlumbrika tero.

Post forta pluvo oni ofte trovas lumbrikojn je la tersurfaco dumtage, ne tial ĉar la vermoj timas droni en la tero (ili ja povas vivi sufiĉe longan tempon en akvo), sed ĉar la aero en la tero post pluvo entenas ege malpli da oksigeno kaj multe pli da karbonacido ol alie. Kutime la lumbrikoj ne venas sur la tersurfacon dumtage. Ili restas en la humo aŭ sub falintaj folioj, eliras nokte por serĉi nutraĵojn, precipe putrantan foliaron sub acero, ulmo, tilio, ĉerizujo, apud brasiko, rapo, karoto, celerio, kreno kaj ajlo. Dentojn ili ne havas, aŭ aliajn malmolajn prenilojn, sed ilon simila al mola lango, kiun ili povas etendi el la buŝo, kaj kiu kun la kapeto funkcias kiel pinĉilo aŭ prenilo. Per ĝi la lumbrikoj tiras de la surfaco pecojn de herbo, ligno, k.t.p., suben, envolvante tion per speco de salivo, kiu pli rapidigas la putradon, kaj baldaŭ la folioj tiom moliĝas, ke ili estas disŝireblaj kaj manĝeblaj. Laborante per lignopecetoj kaj ŝtonoj, la lumbriko montras, ke ĝi estas unu el la plej fortaj animaloj en la mondo kompare kun sia grandeco; ĝi povas transporti ŝtonojn, pezantajn 60-oble tiom, kiom ĝi mem. Tial ni trovas pli bonan humon en foliar-arbaro ol en koniferaj arbaroj, ĉar la bestoj ne povas utiligi la pinglojn por digesti.

La sugesto ke la lumbriko povas fari ankaŭ iom da malutilo, demordante aŭ elterigante malgrandajn ĝermojn, estas parte ĝusta. Ĝi ne povas demordi vegetaĵetojn ne havante mordilojn, sed—eble granda lumbriko, kiu sidas kun sia postaĵo fiksita en sia kanalo, povas renversi vegetaĵeton per sia pinĉilo, kaj tiri ĝin en la teron. Tamen—tiu eta malutilo neniom gravas kompare kun la netaksebla utilo, kiun ĝi faras por ĉia vegetaĵaro sur la tero.

Cetere la lumbrikoj estas hermafroditoj, t.e., ĉiu opa havas kaj virajn kaj inajn orgenojn de reproduktado. Dum la pariĝo, kiu okazas sur la tero, nokte, ambaŭ bestoj gravedigas unu la alian. La klitelo poste sekrecias zonon de muko ĉirkaŭ la besto, kaj ĝi retiras sin malantaŭen el la zono. La seksorganoj situas antaŭ la klitelo, kaj dum la retiriĝo demetiĝas la ovoj en la mukozono, kiu formas kokonon kun nutraĵo por la idoj. La idoj unue similas al blankaj fadenetoj, sed en la daŭro de kelkaj horoj ili fariĝas malpli helaj. Ili estas jam plene evoluintaj lumbrikoj, kiuj povos zorgi pri si mem, kaj dum 3 ĝis 4 monatoj ili fariĝas plenkreskuloj.

Multaj homoj ankoraŭ kredas ke, se oni ŝiras lumbrikon en du pecojn, tiuj povas denove kunkreski. Tio, kompreneble, ne estas ĝusta; la postaĵo mortas, sed la antaŭaĵo, kun la kapeto, povas vivi, kaj iom post iom ĝi elkreskigas novan postaĵon.

La Usona sciencisto d-ro Oliver eksperimentis pri bredado de lumbrikoj kun la celo havigi lumbrikojn por elmetado por ke ili plibonigu la teron. Per-ĥemiaj esploroj li eltrovis specialajn ujojn en kiuj li grandstile elkovis lumbrikojn. La estonto montros ĉu praktike estos profitdone bredi lumbrikojn por komerca celo.

**D-ro Neergaard, Kopenhago (Danlando) :**

# *La nigra grenrusto — kaŭzo de katastrofoj en agrikulturo*

LASTJARE, 1951, la nigra grenrusto kaŭzis tiom da domaĝo al la danaj tritikkampoj, ke la agrikulturistoj pro tiu sola malsano perdis dek milionojn da kronoj. Ofte okazas drameca polemikado kaj esplorado pri la biologio de tiu ĉi grava plantparazito kaj precipe pri la granda rolo kiun ludis la *berberisa arbusto* (Berberis vulgaris) en malvarmaj klimatoj por la vivteno trans la vintroj de la parazito. La berberiso estas leĝe malpermesita en Danujo ekde 1903 kaj tial tre malpliiĝis post tiu jaro la nigra grenrusto en tiu lando. Tiu stadio de la fungo, kiu evoluas sur la berberiso, estas tre grava, ĉar ĝi estas la seksa stadio, per kiu kombiniĝas la malicaj kvalitoj de la diversaj (pli ol 200) infektaj rasoj. Tiamaniere daŭre ekaperas novaj rasoj, kapablaj infekti tritikvariojn, kiuj antaŭe estis rezistaj al la fungo. Novaj rasoj ekaperas 10 fojojn pli ofte en lokoj, kie estas berberiso, ol kie ne. En pli varmaj klimatoj la stadio de somersporoj sur la greno povas vivteni sin de jaro al jaro. La fungo do estas sendependa de la berberiso. La sporoj povas ŝvebi alte en la aero, je 2 km. alte, oni konstatis, kaj longajn distancojn, ĉ. 1.000 km. en iuj okazoj.

**Prof. D-ro Fuĵio Egami, Nagoya (Japanujo) :**

# *Neorganika biologia kemio de nitrogeno*

NITROGENA GASO kaj neorganikaj kombinaĵoj ĉe nitrogeno, ekz. nitrato, nitrito kaj amoniako ludas gravan rolon en biosfero. Ili transformiĝas unu en la alian per la ago de diversaj vivaĵoj. Tiuj transformiĝoj povas esti klasigataj jene :

(1) Nitrogena fiksado
(2) Asimilado de neorganikaj nitrogenaj kombinaĵoj
(3) Nitrifikado
(4) Denitrifikado.

(1) Nitrogena fiksado estas la fenomeno sintezi nitrogenajn kombinaĵojn el atmosfera nitrogeno. Tion oni observas ĉe simbioza *Phizobium* kaj sendepende vivantaj anaeroba butera bakterio, aeroba *Azotobacter* kaj ankaŭ ĉe kelkaj bluverdaj algoj. Tiu fenomeno estas studata precipe de Virtanen kaj Wilson. Ĉar tiu problemo estas tre grava por la agrikulturo, ĝi estas vaste studata de la praktika vidpunkto.

(2) Asimilado de neorganikaj kombinaĵoj : plantoj, ŝimoj kaj kelkaj bakterioj povas kreski uzante nitraton aŭ amoniakon kiel nitratan fonton. Ili reduktas nitraton al amoniako, el kiu ili sintezas organikajn nitrogenajn kombinaĵojn. Mi sukcesis ekstrakti tri enzimojn, kiuj katalizas laŭvice la reduktadon de nitrato, de nitrito kaj de hidroksilamino. Ĉiuj tri enzimoj ŝajnas esti metalo-proteinoj.

(3) Nitrifikado estas la kontraŭa procedo de nitrat-reduktado. Tion oni observas ĉe iuj aŭtotrofaj bakterioj. Nitrifikado estas la procedo kiu produktas necesan energion por la sintezo. Du specoj de bakterioj estas konataj, nome *Nitrosomas*, kiu oksidas amoniakon al nitrito, kaj *Nitrobacter* kiu oksidas nitriton al nitrato.

(4) Denitrifikado estas la procedo produktanta nitrogenan gason el nitrogenaj kombinaĵoj. Tiu procedo kompensas la nitrogenon konsumitan de nitrogena fiksado. Tiu fenomeno estas observita ĉe multaj bakterioj, tamen ĝi preskaŭ ne estas serioze studita.

Resume oni povas diri, ke sur la terglobo aŭ en la biosfero, nitrogena fiksado, denitrifikado, nitratreduktado kaj nitrifikado samtempe okazadas per la kunlaboro de ĉiuspecaj vivaĵoj. Tiamaniere la konstanteco de la konsisto de la biosfero estas garantiata. Tie oni vidas belan harmonion en la mondo de la tuta vivantaro.

**Prof. D-ro Hugo Sirk, Vieno (Aŭstrujo) :**

# *La Brown'a movado*

LA angla fizikisto Brown malkovris en 1827 siaspecan neregulan movadon de mikroskope videblaj solidaj partikloj, ŝvebantaj en fluidaĵo. En la dua duono de la pasinta jarcento la fizikistoj komencis esplori tiun strangan movadon kaj ekskluzivis ĉiujn trivialajn klarigojn por ĝi, kiaj, ekzemple, estus iaj nesenteblaj skuoj, influo de la lumo en la fluidaĵo sub la mikroskopo aŭ konvekciaj fluoj.

Poste ili venis al la konvinko, ke tiu mistera movado estas kaŭzata per la varmomovado de la fluidaĵmolekuloj, kiuj puŝas la ŝvebantajn partiklojn en ĉiujn eblajn, ĉiumomente ŝanĝantajn direktojn. La mikroskope videbla Browna movado estas la senpera sekvo de la movado de la eĉ mikroskope ne videblaj molekuloj kaj samtempe pruvo pri ilia ekzisto. La situacio estas analoga, kvazaŭ ni vidus lorne en foro ŝipon balanciĝantan per la marondoj. La unuopajn ondojn ni ne povas vidi, eĉ ne per la lorno, sed jes ilian senperan sekvon, la balanciĝadon de la ŝipo.

Einstein verkis en 1905 teorion de la Browna movado bazitan sur la molekulkoncepto, kies konsekvencoj estis poste pruvitaj de la franca fizikisto Perrin. La teorio kaj la eksperimentoj kondukis ankaŭ al la absoluta nombro de la molekuloj en unu grammolekulo (molo). La tiamaniere ricevita nombro bone akordiĝas kun la nombro ricevita per aliaj metodoj.

**La supraj estas resumoj de la I.S.U. prelegoj faritaj en Oslo.**



## *Centro de Esploro kaj Dokumentado*

*300, West End Lane, London, N.W.6, Anglujo*

# *Rezulto de Unujara Laboro*

LA 1-an Januaro 1952 publike ekfunkciis la Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA. Jam antaŭ tiu dato, ek de Septembro 1951, estis entreprenitaj ĉiuj necesaj preparlaboroj kaj solvitaj la ĉefaj organizaj demandoj por la starigo de tiu grava institucio. Por ke la Esperantista publiko, precipe la personoj, kiuj finance kontribuis al la celoj de la Centro, havu kompletan bildon pri ĝia laboro, ni publikigas tre resuman raporton pri la ĉefaj taskoj, kiujn la Centro plenumis en la unua jaro de sia ekzistado, nome de Septembro 1951 ĝis la 31-a de Julio 1952.

*Kunlaborantoj :* Fine de la unua laborjaro la Centro havis 68 kunlaborantojn en 16 landoj.

*Organizo :* La direktado de ĉiuj laboroj de la Centro estas farata en la malgranda oficejo en Londono, kie estas konservataj kaj registrataj la ĉefaj dokumentoj, senĉese kompletigataj la necesaj sliparoj, kunmetataj la dokumentoj por dissendo kaj plenumataj la aliaj oficejaj laboroj. La multobligo kaj dissendado de la dokumentoj okazas en la Centra Oficejo de UEA en Rickmansworth.

*Esploroj :* Diversaj kunlaborantoj ricevis la taskon ellabori studojn pri la lingva problemo sur pluraj kampoj de la internacia vivo. Aliaj kunlaborantoj ricevis la taskon verki studojn pri diversaj aspektoj (lingvistikaj, sociologiaj, psikologiaj k.a.) de la problemo de komuna lingvo. Entute estis faritaj 13 tiaj studoj de D-ro Ziegler, D-ro Makkink, Prof. D-ro Privat, Prof. Löwenberg, F. Moravec, Prof. D-ro Lapenna, Doc. D-ro Reiersøl. La studoj de aliaj kunlaborantoj estas finotaj en la sekvanta laborjaro.

*Dokumenta materialo :* Ĉiu grava dokumento pri la Internacia Lingvo estas kolektata kaj registrata tiamaniere, ke ĝi povas esti facile utiligebla por verkado de la dokumentaro, kiun dissendas la Centro. Entute 121 diversaj dokumentoj estis tiamaniere ordigitaj ĝis la 31-a de Julio 1952.

*Dokumentaro :* Proksimume dufoje en la monato la Centro dissendis al diversaj gravaj internaciaj organizaĵoj specialan dokumentaron pri nia afero. La dokumentaro estas ordigita laŭ serioj, sekcioj kaj numeroj. En la unua laborjaro estis dissenditaj 16 diversaj dokumentoj en angla, franca kaj nederlanda lingvoj al 104 internaciaj neesperantistaj organizaĵoj ; krome al la Komitatanoj de UEA.

*Dokumentaro por aparta celo :* La Centro ellaboris tute specialan dokumentaron por celo, pri kiu en la nuna momento ne estas oportune publike paroli. Tiu dokumentaro, ellaborita en kunlaboro kun S-roj Reto Rossetti kaj Hans Jakob, ampleksas pli ol 100 dense tajpitajn paĝojn. Tiu ĉi dokumentaro en konciza formo prezentas ĉiujn atingaĵojn de Esperanto en ĝia 65-jara ekzistado. Se la financaj rimedoj iam

permesos, estus utile publikigi ĝin en presita formo.

*Alvoko al sciencistoj :* Pere de siaj kunlaborantoj kaj ISAE la Centro prizorgis la tradukojn kaj la disdonon de la Alvoko al sciencistoj en diversaj landoj.

*Statistiko pri la Esperanto-Movado :* Tiu ĉi laboro, komencita en la kadro de la Informa Fako de UEA kaj daŭrigita de la Centro, estis finita en tiu ĉi jaro. La rezultoj estas publikigitaj en la junia numero de *Esperanto*.

*Socia konsisto de la Esperanto-Movado :* Tiun gravan laboron faras la kunlaboranto de la Centro, S-ro C. Keur. Li kunmetis, post interkonsiliĝo kun kompetentaj fakuloj, specialajn demandofoliojn kaj dissendis ilin al siaj kunlaborantoj en diversaj landoj. La laboro kontentige progresas kaj ĝi estos finita en la sekvanta laborjaro.

*Bibliografio :* La kunlaboranto de CED S-ro W. Auld ellaboris Bibliografion de Esperantaj publikaĵoj por la periodo inter 1945 ĝis Marto 1952. Por tiu periodo li entute registris 475 publikaĵojn. Nun S-ro Auld ellaboras Bibliografion por la periodo de 1929 ĝis 1945 kaj plue sekvas la novajn publikaĵojn. Tiamaniere en baldaŭa estonteco ni havos kompletan Bibliografion.

*Livero de artikoloj :* La Centro liveris al siaj kunlaborantoj en diversaj landoj 2 artikolojn, por ke ili estu publikigitaj en la naciaj lingvoj. La artikolo de Prof. Privat estis publikigita en 11 italaj, 1 belga kaj 1 nederlanda gazetoj.

*Vojaĝoj, konferencoj, prelegoj :* La honorofica direktoro de la Centro havis plurajn personajn konferencojn, inter la aliaj kun la sekretario de la Informa Departmento de OUN en Parizo, kun la kompetentaj oficistoj de UNESKO, kun la Nederlanda Ministro de Edukado k.a. Okazis pluraj prelegoj, en kunligo kun la celoj de la Centro, en Londono, Parizo, Rotterdam, Bologna k.a.

La Centro povis plenumi tiom da taskoj en tiel mallonga tempo kaj per relative treege malgrandaj financaj rimedoj nur dank' al oferemo kaj altaj kvalifikoj de siaj kunlaborantoj, dank' al akurata plenumo de la tradukoj fare de la tradukantinoj (Fraŭlinoj Minault, Reed, Vermaas), dank' al materia subteno de UEA kaj de pluraj esperantistoj el diversaj landoj.

En la nova laborjaro la Centro daŭrigos la jam komencitajn, sed ankoraŭ ne finitajn laborojn. Ĝi klopodos pliampleksigi la reton de kunlaborantoj kaj altigi la nombron de dokumentoj, kiujn ĝi eldonas en la naciaj lingvoj. Tute speciale la Centro faros ampleksan esploron pri la instruado de fremdaj naciaj lingvoj en diversaj landoj, pri la nombro de lernantoj, pri la tempo uzita por tiu celo k.t.p.

Estas espereble, ke en la sekvanta laborjaro la Centro havos ankoraŭ pli grandan moralan kaj financan apogon fare de la tuta esperantistaro.

*Ivo Lapenna.*

**Atentigo pri la taskoj de la Centro !**

La taskoj de la Centro estas sciencaj esploroj kaj dokumentado de ĉiuj atingaĵoj sur la kampo de Internacia Lingvo antaŭ neesperantistaj internaciaj gravaj instancoj. Tion ni tre substrekas, ĉar sufiĉe granda nombro da esperantistoj iom miskomprenis la rolon de la Centro kaj opiniis, ke ĝi

*daŭrigo sur p.* 322



# *Nia Forumo*

## PAROLAS LA LEGANTOJ

**Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron, por publikigo kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.**

**Presigo de letero de korespondanto ne necese signifas ke U.E.A. oficiale subtenas la esprimitajn opiniojn.**

### Alvoko

La geaŭskultantoj de Radio Roma estas afable petataj havigi al ni donace ĉiaspecajn turismaĵojn presitajn en Esperanto (faldfolioj, afiŝoj, ilustritaj poŝtkartoj, k.s.).

Per la ricevota materialo la Itala Turisma Organizaĵo E.N.I.T. varbos la provincajn italajn turismajn oficejojn publikigi turismajn eldonaĵojn (krom en la ceteraj naciaj lingvoj) ankaŭ en Esperanto. Tial la ricevota materialo ne estos resendata. Tutcerte ni kvitancos la ricevon per sendado de bele ilustrita poŝtkarto kaj, laŭ disponebleco, per interesa analoga materialo pri Italujo.

Antaŭdankojn.

*La Esperanta Voĉo,*
Via V. Veneto 56, ROMA, Italujo.

### Helpopeto

Ekde la komenco de 1952 Esperanta rubriko aperas ĉiudimanĉe en la franca ĵurnalo *Nord Eclair*. Bonvolu helpi min redakti tiun rubrikon per la sendo de aktualaj informoj.

*L. Giloteaux,*
28 rue des Jardins,
CROIX (Nord) Francujo.

---

*daŭrigo* (*de p.* 321)

estas ia oficejo por donado de ĉiaspecaj informoj. Okazis, ke oni turnis sin al la Centro kun demandoj pri adresoj, kun petoj pri alsendo de propaganda materialo, perado de vojaĝoj, tralego de diversaj manuskriptoj k.t.p., kio havas nenian rilaton kun la laboroj de la Centro. Tiaspecaj petoj tiom amasiĝis en la lasta tempo, ke ili multe malhelpas la senĝenan plenumadon de la taskoj, por kiuj la Centro estas fondita. Ni tre afable petas ne turni sin al la Centro en tiaj aferoj, ĉar la personoj laborantaj en ĝiaj kadroj—pro la vere grandega laboro—absolute ne povas respondi al tiaj petoj.

### Donacoj al CED
### por la laborjaro 1952–53

| | £ | ŝ. | p. |
|---|---|---|---|
| S-ro R. Llech-Walter, Francujo | 10 | 0 | 0 |
| D-ro Maillard, Francujo .. | 1 | 0 | 0 |
| S-ro R. Watier, Francujo .. | 1 | 0 | 0 |
| S-ro R. C. Marble, Usono .. | 1 | 0 | 0 |
| Reĝa Belga Esperantista Ligo .. | 1 | 0 | 0 |
| *Sume la 29-an de Sept.* 1952 | £14 | 0 | 0 |

La donacojn por CED oni povas sendi al UEA en Rickmansworth aŭ al Unuiĝo Esperantista Franca, 34, Rue de Chabrol, Paris, X, aŭ al la Centro mem.

**D-ro Arthur Baur :**

# *La kvara lingvo de Svislando*

ĜENERALE oni scias, ke en Svislando estas parolataj tri lingvoj — svisgermana, franca kaj itala—kiuj vivas pace unuj flanke de la aliaj. Tiu scio tamen estas nekompleta ĉar Svislando eĉ posedas kvar lingvojn, el kiuj la kvara eble estas la plej interesa kaj certe la plej svisa ĉar ĝi ne estas samtempe granda kulturlingvo en aliaj landoj. Tiu lingvo estas la retorumanĉa, oficiale rekonita en la svisa federacia konstitucio kiel kvara nacia lingvo de Svislando kaj parolata de 42,000 homoj. Do ĝi verŝajne estas la plej malgranda oficiala lingvo de Eŭropo.

La hejmo de la retorumanĉa lingvo estas la kantono de Grizono, la plej granda sed ne la plej popolriĉa kantono de Svislando, kiu havas germanlingvan plimulton kaj krome unu itallingvan parton. En la montaraj regionoj de tiu kantono—ŝatata centro de turismo—la retorumanĉa lingvo sukcesis konserviĝi. En la mezepoko la tuta kantono kaj grandaj partoj de orienta Svislando estis ankoraŭ retorumanĉaj, sed en paca konkero la germana lingvo akiris la regionojn pli facile alireblajn. La historio de la retorumanĉa lingvo komenciĝis per la jaro 15 antaŭ Kristo, kiam la Romanoj konkeris la alpajn regionojn en kiuj loĝis la sovaĝa tribo de la Retianoj "Rhaeti". Kiel la originaj



Du belulinoj de Bündnertracht en nacia kostumo

*foto :*

*Office Central Suisse de Tourisme, Zurich*

enloĝantoj de Hispanujo, Francujo, Rumanujo, ankaŭ la Retianoj baldaŭ transprenis la latinan lingvon kaj en la jarcentoj post la disfalo de la roma imperio evoluigis ĝin laŭ sia propra maniero. Samtempe ili konservis ankoraŭ kelkajn vortojn el sia origina lingvo, precipe esprimojn por la alpaj vivo, lokoj kaj ekonomio kaj transprenis el la germana lingvo vortojn por metioj. Tamen 75-80 procentoj de la hodiaŭa retorumanĉa vortaro estas latindevenaj, do la lingvo ne havas miksitan karakteron.

Dum la pli grandaj fratinoj de la retorumanĉa lingvo en Italujo, Francujo kaj la aliaj tiel nomitaj romanaj landoj jam en la mezepoko eniris literaturon kaj poste travivis admirindan kulturan ekfloron, la historiaj fontoj silentas pri la retorumanĉa lingvo ĝis la deksesa jarcento. El tiu tempo ni havas la unuan presitan dokumenton, biblion tradukitan de Giachen Biffrun. La reformacio kaj la kontraŭreformacio vekis viglan literaturan vivon kaj postlasis relative grandan nombron de religiaj verkaĵoj kaj de popolaj teatraĵoj. Bedaŭrinde oni tiam ne sukcesis krei komunan literaturan rumanĉan skriblingvon, ĉar laŭ konfesio la rumanĉa teritorio estis splitita kaj la altaj montoj malhelpas intensivan interrilatadon de la popolo en la diversaj valoj. Krome mankas urba centro. Pro tiuj kaŭzoj, evoluis retorumanĉaj dialektoj, kiuj estas tre malsamaj unuj de la aliaj, kaj pro la samaj kaŭzoj ili ne povis unuiĝi en komuna skriblingvo. Oni devas distingi du ĉefajn skriblingvojn, la ladinan en la Engadino kaj la sursilvanian en la fontovaloj de la Rejno. La ladina lingvo havas du branĉojn (en supra kaj malsupra Engadino) kaj al la sursilvana aldoniĝas ankoraŭ la skriblingvo de Surmeir, la centro de la rumanĉa teritorio. Tiu splitiĝo estas enorma* malhelpo por la kulturado de la retorumanĉa lingvo, kaj cetere kaŭzas grandan financan ĉagrenon al la kantono, kiu devas presi la abc-librojn por la malgrandaj retorumanĉoj en kvar diversaj specoj de rumanĉa.

La lerneja instruado okazas dum la unuaj kvar jaroj pure en retorumanĉa lingvo, poste oni komencas la instruadon de la germana lingvo, kiu en la superaj klasoj mem fariĝas instrulingvo en kelkaj fakoj. La retorumanĉoj estas preskaŭ senescepte dulingvaj, krom sia propra lingvo ili kutime bone scias la germanan lingvon. Ili ankaŭ tre facile lernas la francan kaj la italan lingvojn pro la parenceco, kiun tiuj idiomoj dankas al la komuna latinida deveno. Do ili havas facilan aliron al la grandaj kulturoj, sed por siaj lokaj aferoj servas al ili perfekte la retorumanĉa : en la lernejo, en la preĝejo, en la societa vivo de la vilaĝoj kaj en la politika administrado. Ili havas siajn gazetojn, kalendarojn, librojn kaj siajn regulajn sendhorojn en la radiostacio de Beromünster.

La moderna trafiko signifis grandan danĝeron por la retorumanĉa lingvo, kiu ne plu povis profiti de sia izoleco en la montaro. Fakte ĝi devas energie defendi sin kontraŭ la germana lingvo, kiu minacas la vivon de la rumanĉa, eĉ sen la intenco de la germanlingvaj svisoj ; tiuj kontraŭe eĉ morale simpatias la rumanĉan kaj finance subtenas ĝin per federaciaj subvencioj. En St. Moritz, la fama fremdula centro, kiu origine nomiĝis San Murezzan, la rumanĉa jam perdis la batalon. La retorumanĉa


* enorma = grandega

popoleto tamen ne volas perdi sian lingvon kaj ĝuste la minaco kaŭzis ke ĝi komencis veran ekfloron de la retorumanĉa literaturo, kiu posedas verkaĵojn de granda valoro, kaj krome formiĝis unuiĝoj celantaj la kulturadon de la rumanĉa lingvo. Apud la belliteraturo hodiaŭ ne mankas gramatikoj kaj modernaj vortaroj. Tiamaniere oni povas hodiaŭ paroli pri vera renesanco de la retorumanĉa lingvo. Kiu interesiĝas pri tiu literaturo trovas sufiĉe detalan parton en la *Svisa Antologio*,* kiun eldonis Literatura Mondo en 1939. Kiel lingva provo servu jena strofo el poemo de Gudench Barblan kun laŭvorto traduko :

*Chara lingua da la mamma,*
*tü sonor rumantsch ladin,*
*tü favella dutscha, lamma,*
*o co t'am eu sainza fin !*
*In teis suns cur air' in chüna,*
*m'ha la mamma charezzà*
*e chanzuns da l'Engiadina*
*in l'uraglia m'ha chantà.*

Laŭvorte : Kara lingvo de l'patrino, vi belsona ladina rumanĉa, vi dolĉa, mola lingvo, ho kiel vin mi amas sen fino ! En viaj sonoj, kiam mi estis en la lulilo, min la panjo karesis kaj kantojn pri la Engadino en la orelojn al mi kantis.

* bedaŭrinde ne plu aĉetebla (Red.)



Arosa

*foto :*
*Office Central Suisse de Tourisme, Zurich*

# *Belarta Konkurso de U.E.A. 1952*

## *Raporto de la Sekretario*

**Partopreno** okazis laŭ jena tabelo. La simplaj ciferoj donas la nombron da personoj, la enkrampaj donas la nombron da konkursaj verkoj.

| | *Branĉo A* Originala Poezio | *Branĉo B* Tradukita Poezio | *Branĉo C* Originala Prozo | *Branĉo D* Tradukita Prozo | *Branĉo E* Originala Teatraĵo | *Branĉo F* Tradukita Teatraĵo |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Aŭstralio .. | | | 1 (1) | | | |
| Aŭstrujo .. | 1 (3) | 2 (4) | | 1 (1) | | |
| Belgujo .. | | 1 (1) | | | | |
| Britujo .. | 5 (13) | 6 (10) | 2 (3) | 2 (2) | 4 (5) | |
| Ĉeĥoslovakujo | 2 (6) | 1 (1) | | | | |
| Danlando .. | | | | 1 (2) | | |
| Francujo .. | 2 (6) | 3 (7) | | 1 (1) | 1 (1) | 1 (1) |
| Germanujo .. | 1 (3) | 1 (1) | | | | 1 (1) |
| Hispanujo .. | 1 (1) | | | | | |
| Italujo .. | 1 (1) | 1 (1) | | | | |
| Jugoslavujo .. | 1 (3) | | | 1 (1) | 1 (1) | |
| Nederlando .. | | | | 1 (2) | | |
| Norvegujo .. | | 1 (2) | | | | 1 (1) |
| Nov-Zelando .. | 1 (1) | | | | | |
| Svedujo .. | | 1 (15) | | | | |
| Turkujo .. | 1 (1) | | | | | |
| Urugvajo .. | 1 (3) | 1 (1) | | | | |
| Usono .. | | 1 (1) | 1 (1) | | | |
| Sume .. | 17 (41) | 19 (44) | 4 (5) | 7 (9) | 6 (7) | 3 (3) |

La 15 poemetoj de svedo en branĉo B konsistigis unu serion, kaj post interkonsiliĝo la juĝantoj allasis ilin kiel unu eron.

Pluraj konkursantoj partoprenis pli ol unu branĉon. Efektive partoprenis la konkurson 43 personoj el 18 landoj per 109 konkursaĵoj.

Krome 6 personoj sendis ankoraŭ 13 verkojn, kiuj troviĝis ial neregulaj kaj sekve ne estis allasataj al la konkurso.

**Premioj.** Ĉiu premiito ricevis diplomon kaj ankaŭ premion laŭ la jena tabelo. Branĉoj A kaj B, pó jenaj sumoj : 10.000 italaj liroj ; £2 (britaj pundoj) ; £1. Branĉo C : £2.50. Branĉo D : £2 kaj £1. Branĉo E : £2.50 ; £1.50 ; £1. Branĉo F : £2.50.

La du premioj po 10.000 liroj estas malavare donacitaj de S-ro Gino Catarzi el Treviso, Italujo. Ili nomiĝas (A) la Laŭro Esperanto kaj (B) la Laŭro Zamenhof, de la seslingva poezia konkurso Paneŭropo. S-ro Catarzi estas motoro kaj mecenato de tiu konkurso. Li ankaŭ ebligis per materiala subteno, la eldonon de la fama Infero-traduko (Dante-Kalocsay).*

* nun ne akirebla (Red.)

*R. Rossetti.*

# *Pri la Prozo*

## (raporto de D-ro Szilágyi)

SUME 24 konkursaĵoj alvenis al la proza parto de la ĉijaraj konkursoj. Ankaŭ en tiu ĉi sekcio oni povas konstati, ke la nivelo estis konsiderinde alta : 13 verkoj atingis la notojn super 50.

El la originalaj rakontoj, sume 5, elstaras la novelo de D. Richardson, Usono, kun la titolo "Rosario".* Rutina, bela, esprimriĉa, samtempe simpla lingvaĵo, plastika rakontmaniero, klara konstruo kvalifikas tiun ĉi verkon por la unua premio. La aŭtoro povis veki intereson kaj resonon je temo, kiu en si mem estas ofte ripetata en la literaturo. Bedaŭrinde precipe laŭ la konsidero de lingvaj malglataĵoj la komisiono ne donis premiojn al la sekvaj verkoj, sed mencias la meritojn de tri konkursaĵoj : "Venĝo", de Eileen de B. Daly, Anglujo ; "Mia Unua Publika Parolado", de Frank Halls ; "Via Ministra Moŝto", de M. Boulton, Anglujo.

El la tradukoj de prozaĵoj la konkursaĵo de E. Lane, Anglujo, t.e. traduko el la verko "Tifono" de Joseph Conrad, kun la titolo "Ŝipo en Morta Danĝero" montris sin inda por la unua premio. La tradukinto solvis sian malfacilan taskon kun riĉa esprimkapablo kaj la tradukaĵo el arta vidpunkto reprezentas altan kvaliton. Ankaŭ la dua premiito, t.e. Societo Esperantista, Mulhouse, plenumis sian memelektitan taskon, tradukon de verketo de Cronin ("La Kuracisto de Lennox") laŭdinde, kvankam la kvalito de la traduko ne atingas la supre menciitan kaj el certa vidpunkto ankaŭ la elekto de la tradukintoj ne estis bonŝanca ; ili tradukis ne el la originalo, sed el la traduko franca de la originala artikolo. Entute alvenis naŭ konkursaĵoj al tiu ĉi kategorio, el kiuj la komisiono deziras distingi per honora mencio ankaŭ la tradukon de Betsy Leopold el Nederlando. La titolo de la tradukaĵo estas "La Binoklo", kaj la aŭtoro estas Couperus.

Al la branĉo "Originalaj Dramoj" alvenis sep konkursaĵoj. Laŭ la decido de la komisiono pro certaj konsideroj tri premioj estos eldonataj. Per la unua premio ni distingis la verkon "Taso da Teo" de Eileen de B. Daly. La verketo estas ĉarma scenfabelo en ĉina, arĥaika medio. Delikata, naiva (en la plej bona senco de la vorto) prezentmaniero, fabela etoso donas ĝuon al la leganto aŭ vidanto. La komisiono donis la duan premion al Marjorie Boulton, Anglujo, por la verko "La Marfundo". Kun realismo traplektita simbolismo karakterizas tiun ĉi konkursaĵon, kies

* *vidu paĝon* 331

malpli gravaj minuspoentoj estas lingvaj. Kelkloke ankaŭ la karakterizo de la figuroj estas iom tro ĝenerala. La komisiono distingis per la tria premio la verkon "Brikoj kaj Mortero", de Ewart Clark, Anglujo. Arta, delikata prezento de homa tragedio, tragika momento, dignigas la verketon por la tria premio. La komisiono kun honora mencio distingas la konkursaĵon de Eileen de B. Daly, Anglujo, kun la titolo "La Konkurso", kaj per merita mencio la verkon de Emilija Lapenna, Jugoslavujo: "La Galerio de Fiecoj".

Al la kategorio "Tradukitaj Dramoj" apartenas tri verkoj, el kiuj la traduko de la dramo de Meitzinger—tradukinto G. Ritterspach, Germanujo, ricevis la unuan premion. La traduko estas bona, konfidinda, verva, kvankam ĝi ne eluzas tute la eblecojn, kiujn la originalo prezentas per la karakterizo de kelkaj roloj. La sama rilatas la tradukon de alia konkursaĵo, t.e. "Nigra Kafo" de Bastian, tradukitan el dialekta germana lingvo. La tradukinto ne tute sukcesis transigi de la originalo en nian lingvon, sed liaj meritoj nepre estas menciindaj.

## *Pri la Poezio*

**(raporto de S-ro Waringhien)**

LA juĝanta komisiono ricevis 41 originalajn poemojn de 17 poetoj. El tiuj 41 pecoj, 22 —t.e. pli ol la duono—atingis sume notojn inter 50 kaj 100, kaj estis do superaj al la meza valoro. Tia rezulto estas sufiĉe interesa por ke ni insistu pri ĝi: la ĝenerala nivelo de tiu ĉi konkurso estas do tre bona, kion cetere montras la fakto, ke, krom en unu-du poemoj, ne estis troveblaj gramatikaj eraroj. Sekve, la komisiono estis iom pli postulema pri la atribuo de la rekompencoj.

La Unua Premio estis atribuita al la poemo de John Francis, Skoto: "Al malfruaj Solenontoj de la Tago de Rememoro". Krom la artismo de la formo—la trioblaj rimoj de la tercio iom alportas kun si solenecon kaj tragikecon de la "Dia Komedio"—la humura amareco, la subpremita indigno donas al la satiro ian densecon kaj gravecon, kiu faras ĝin vera antologia peco.

En la duarange premiita poemo, de la Ĉeĥino Eli Urbanová "En Arbaro", la juĝantoj ŝatis samtempe la pitoreskan pentron de la vivo de arbaro, la diskretan ĥumuron pri la eteco de homo en la naturo, kaj precipe la tre lertan formon, neatenditajn rimojn, internajn aliteraciojn, kaj la esceptan kvaliton de la klara, konciza, vortfeliĉa lingvaĵo.

La tria kronita poemo de la Ĉeĥo Jiĥi Kořinek "Meditado", prezentas formon kaj penson egale altkvalitajn. Se ĝin ornamus kelkaj pli originalaj, pli imagskuaj bildoj, ĝi estus atinginta tre certe la unuan rangon.

Estas la leĝo de tia konkurso, ke oni ne povas, post la kalkulo de ĉies notado, ŝanĝi eĉ malmultege la ciferojn, kiujn oni mem atribuis. Sed tion mi neniam pli bedaŭris, ol ĉi-foje: ĉar, post tiuj tri premioj, venas, je unu duona poento da distanco (el 100!) du belaj poemoj de J. Dinwoodie, Skoto, "Senmorteco" kaj "Maljuno", kiuj certe meritis egalan triarangan premiecon: profundo de la penso, sincero de la emocio, harmonio de la

versoj, ĉio tio devigas nin atribui al ili almenaŭ unu honoran mencion.

Meritajn menciojn ni atribuis al jenaj verkoj : "Lageto", de John Francis ; "Nimfoj", de Eli Urbanová ; "Junedeno", de L. Laurat ; kaj "Memoro", de William Auld. En malpli dense konkurata konkurso tiuj belaj verkoj estus certe ricevintaj la premiojn.

Ĉu mi permesos al mi ĉi tie doni al la konkurintoj, almenaŭ al kelkaj, konsilon pri unu flanko de la versteknikо ? Ŝajnas al mi, ke tro ofte la poetoj ne sufiĉe zorgas pri la varieco de la finiĝa vokalo de la rimoj. Mi ja scias, ke nia lingvo disponas nur kvin vokalojn, sed estas ankaŭ la diftongoj kaj la konsonantoj -s kaj -n, kiuj liveras almenaŭ 17 diversajn finaĵojn (se ne kalkuli la pluralajn akuzativojn, kiuj malpli akre distingiĝas de la nominativoj). Nu, la poetoj apenaŭ uzas tiun klavaron : en unu, hazarde elektita poemo 20 versoj el 36 finiĝas per -o, kaj tia monotono multe deprenas de la arta efekto. La samon mi diros pri la viraj rimoj. Timigitaj, eble, de ia kampanjo kontraŭ la apostrofitaj vortoj (kampanjo vigle apogata de tiuj, kiuj kutimas peti de la oratoroj "Malpli rapide !" k.t.p.), poetoj hezitas uzi tiun potencan rimedon pri diversigo kaj pri drasteco : en iuj okazoj, la vira rimo estas kvazaŭ postulata de la penso por "vire", energie fini strofon aŭ verson aparte gravan. Alifoje, ĝi alportas flatan ŝanĝon al la orelo kaj iel vivigas strofon, kiu alie ŝajnus endormiĝi en griza unutoneco.

* * *

En la fako de la tradukita poezio, estis prezentitaj 44 pecoj de 19 poetoj ; el ili 23 atingis aŭ superis la mezan nivelon : la proporcio estas do preskaŭ la sama, kiel ĉe la originala poezio, kvankam ĉi tie partoprenis 11 aliaj poetoj (nur 8 konkuris por la du fakoj). La juĝado de la proponitaj verkoj estas pli malsimpla, ol ĉe la unua fako. Tie ĉi, efektive, ni devis atenti kaj la valoron de la originalo, kaj la kvaliton de la traduko : traduko de malbona, banala aŭ vulgarsenta poemo, eĉ se ĝi estus tute bona, ne povus doni en Esperanto ion pli altnivelan, ol la originalo mem. Aliflanke, la provo traduki malfacilan, artoplenan ĉefverkon, eĉ se ĝi ne tute sukcesis, meritas tamen laŭdon.

La Unuan Premion gajnis S-ro William Auld, per traduko el Clive Sansom : "Maria de Magdalo", la Duan S-ro Roger Bernard per traduko el Roméo Carlès : "Tenereco". Ambaŭ tradukoj (kiujn la juĝantoj taksis preskaŭ samvalore, kun diferenco de nur unu poento) estas de tre malsamaj specoj : la unua montras religieman, profunde humanan inspiron, la dua estas sprita parodio de sentimentala kor-elverŝo : sed ambaŭ kontentigas la guston per sia fleksebla kaj riĉa lingvaĵo, la ĝusteco de la tradukstilo kaj la eleganteco de la versa formo. La trian premion gajnis S-ro J. Dinwoodie per "Disciplino", de George Herbert. Honorajn menciojn ricevis "Al Elektra", de George Herbert tradukita de J. Dinwoodie ; "Hakon", de J. Vřehlicki tradukita de J. Kořinek ; "Penetri tiun ĉambron . . . ", de John Lehmann tradukita de W. Auld. Ĉiuj ĉi poemoj meritas esti distingitaj pro sia arta ellaboriteco.

Apartan meritan mencion ni volas fari pri la traduko de la Unua Kanto de la "Purgatorio" el la Dia Komedio de Dante—pro la aŭdaco kaj la laboremo, kun kiuj s-ro V. Musella

atakis tiel malfacilegan taskon. Sed la neperfektaĵoj de la formo (adasismoj, karamboloj, k.t.p.) ne permesis al ni doni pli altan rekompencon, ol ĉi tiu kuraĝiga marko.

Finfine, mi aldonos ankoraŭ unu rimarkon, pri la elekto de la verso-specoj en kelkaj tradukoj.

Hodiaŭ, kiam ni havas por nia instruo la modelojn lasitajn al ni de Baghy, Kalocsay, k.t.p., kiam ni povas delikatigi kaj lertigi nian orelon pri la subtiloj de nia Esperanta prozodio, oni ne plu rajtas kredi, ke sufiĉas aranĝi la akcentajn aŭ ne-akcentajn silabojn laŭ ia aprioria skemo por ricevi harmonian verson. La fonetiko de nia lingvo estas tia, ke en ĝi abundegas la trokeoj (ekz. : homo) kaj la amfibrakoj (ekz. : homaro) ; sekve, ke ĉe versoj konstruitaj el tiuj du piedoj, oni devas severe zorgi, ke ili ne forfluu en ordinaran senritman prozaĵon. En praktiko, iom delikata orelo ne povas toleri amfibrakan verson pli longan ol kvarpiedan : tia estas la ritmo de "La Vojo" de Zamenhof (en kiu, krome, tripiedaj estas intermetitaj, por distri la orelon per pli ofta revenigo de la rimoj). Aliflanke, ĉiu verso pli longa ol dekunu silaboj postulas fiksan cezuron, kiu servas unue por faciligi la eldiradon per paŭzeto, due por redoni al la aŭdanto la ĝustan senton pri la takto. Jen kial, en la ses- aŭ sepjambaj versoj, tiu cezuro devas ĉiam esti vira. Sesjambo kun ina cezuro donas la falsan impreson de trijamba verso sekvata de tritrokea, kaj tiu rompo de la takto estas tre malplaĉa. Precipe, kiam temas pri esperantigo de la franca dekdu-silaba verso, en kiu la du hemistikoj devas esti egalaj, estas tute malkonsilinde uzi sesjamban verson, eĉ kun vira cezuro. En tia okazo la aleksandro, tiel majstre uzata de Kalocsay kaj de multaj postvenintaj poetoj, estas la sole akceptebla solvo.

# *Esperantista Vivo*

## *Naskiĝoj*

**Hut.** Al Ges. J. L. Hut, en Utrecht, Nederlando, unua infano, filo Peter, 26an de Septembro 1952.

**Moen.** Al Ges. P. Moen, en 's-Gravenhage, Nederlando, filino Anne-Marie, 5an de Oktobro 1952.

**Postl.** Al Ges. Alois Postl, en Dollach, Aŭstrujo, filo Esperno, 10an de Septembro 1952.

## *Gefianĉiĝo*

**Cree-Finbow.** F-ino Eva Cree, ano de la grupo en Halifax, Anglujo, kun S-ro Alec L. Finbow, ambaŭ fervoraj samideanoj.

## *Niaj mortintoj*

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.—Red.

**Collado,** S-ino Leonor, edzino de nia delegito en Santander, Hispanujo, forpasis la 6-an de Septembro, 1952, 55-jara.

**Fawcett,** Prof. C. B., antaŭe profesoro de geografio en la Universitato London, forpasis la 22-an de Septembro, 69-jara.

**Fregonara,** F-ino Clairette, 28-jara samideanino el Nice, subite forpasis la 9an de Oktobro, en Ĝenevo, Svislando.

**Pedraz y Palacio,** José E., dumviva membro de UEA, forpasis la 16-an de Septembro, en Madrid, 51-jara.

# *Belarta Konkurso 1952 : Prozo Originala*

**D. Richardson :**

**1-a premio**
**Noveleto**

## *Rosario*



"PARDONU, Sinjoro, sed ĉi tie oni ne permesas fumi." Johano turnis sin kaj rigardis al la bluvestita stevardo, ne kompreninte. "Oni ne fumu sur la motorferdeko, Sinjoro."

Johano kapgestis, forĵetis la cigaredon al la ŝaŭmanta akvo. Ĝi restis videbla momenton, ŝajne senmova sur la akvomonteto. Tiam la akvo glitis suben en valeton, kaj la cigaredo malaperis sub la ŝaŭmo. Li iris al la ŝtuparo kaj supreniĝis al la pasaĝera salono. Ekstere, la suno brilis sur la markolon Puget, kies enlandaj akvoj boletis milde inter la multegaj verdaj insuletoj. Tie kaj tie malgrandaj fiŝbarkoj aŭ jaktetoj kun ekskursantoj vidiĝis. Unu ekskursa barketo venis proksimen al la pramŝipo *Rosario*, kaj kvar gejunuloj salutis, gestante per manoj kaj poŝtukoj. Sur la *Rosario* turistoj en bonkvalitaj vestaĵoj umadis per fotografaj iloj. Aliaj pasaĝeroj, ne rimarkante la eksterajn vidaĵojn, sidis silente, enuigitaj. La plejparto de ĉi tiuj estis insulanoj, kiuj enŝipiĝis en Anacortes por reveni al siaj hejmoj en Orcas, aŭ Shaw, aŭ Friday Harbor. Multaj el ili estis same laboriste vestitaj kiel Johano, kun dikaj ĉemizoj el plurkolora lano, kaj kun trouzitaj pantalonoj.

Johano prenis seĝon ĉe la servotabulo de la ŝipa restoracio. Li mendis kafon, kaj bruligis cigaredon. Ĉi tiun fojon ! li promesis al si. Ĉi tiun fojon mi faros tion, kion mi devus esti farinta jam antaŭ du jaroj. Du jaroj . . . Tiam, sur ĉi tiu pramŝipo, li konatiĝis kun ŝi, kaj dum unu horo ili estis kune. Nur unu horon, sed en lia imago li vidis ŝin ankoraŭ, juna, bela, ridetanta al li. "Kiel vi nomiĝas?" ŝi estis demandinta, kaj li respondis embarasite "Johano Redway," embarasita pro la apudeco de ĉi tiu knabino. Estis nebulo tiam, densa nebulo, kaj la pramŝipo navigaciis "per la fajfilo," kiel diras la ŝipestro, fajfigante kaj sciante per la eĥoj la precizan lokon de la ŝipo. Li pensis longe pri tiu tempo, kiel stulte li parolis al ŝi, li ne povis kulpigi ŝin pri tio, ke ŝi ne respondis al liaj leteroj. Tamen, nun, li metos la aferon en la ĝustan ordon. Li ja multfoje ripetis al si la vortojn, kiujn li diros al ŝi ĉi tiun fojon. Kuraĝe, kun plena posedo de la emocio, li konigos al ŝi sian amon. Mario, li diros, mi estis stulta naivulo, estis mia kulpo tio, kio okazis. Sed mi pensis nur pri vi dum du longaj jaroj, kaj mi devis, mi devis veni al vi. Mi amas vin, Mario, nur vin. Sen vi mi ne povos, mi ne volas vivi. Kaj tiam ŝi, Mario, estos la vico al ŝi kaj ŝi diros, Johano, Johano, vi venis, mi sciis, ke vi venos. Johano, mi amas vin . . .

La cigaredo brulis kontraŭ liaj fingroj. Li estingis ĝin en la kafo, kiu estis ŝprucinta en la subtason.

Komenciĝis ioma movado inter la pasaĝeroj, kaj Johano konstatis, ke oni estas aldokiĝonta en Orcas. Li ekstaris, pensante ke duono de la

veturo jam pasis, .kaj rigardis el la fenestro. Sur la motorferdeko sube, la ŝipistoj forprenis la barilan ĉenon de la pruo kaj aŭtomobilaj motoroj ekfunkciis dum la doko pli kaj pli proksimiĝis. La pruo tuŝis fostaron ĉe la flanko de la doka alirejo, kaj tiel gvidiĝis ĝuste sub la dokofino. Ŝipisto saltis supren al turnlevilo sur la doko, kaj mallevigis la finon de la pasponto al la ferdeko. Tri aŭ kvar aŭtomobiloj kaj pluraj piedirantoj albordiĝis. Eksonis fajfeto kaj la pramŝipo estis preta renaĝi for de la doko. Johano prenis novan cigaredon kaj bruligis ĝin.

Forprenante la alumeton, Johano vidis la malbelan cikatron sur lia mano, ankaŭ la malplenon inter la dua kaj kvara fingroj. Li grimacis, subite pensante pri la segejo, kie li, ŝvitante, penegante, pecigis la gigantajn abiajn trunkojn; pri la akcidento, kiam li, kiel ĉiam profundiĝanta en siaj pensoj, ne retiris sufiĉe rapide la manon for de la maŝinaro. Li eĉ ne rimarkis la elŝprucantan ruĝaĵon, nek la doloron, ĝis pasis jam kelkaj sekundoj kaj kunlaboranto kaptis lian brakon por preni lin for. Ankaŭ tiam li pensis, nur pri Mario, pri ŝi, tiel bela kaj juna.

Mario . . . Ili staris tie, en la koridoro de la salono, penante vidi ion en la nebulo ekster la fenestro. Li tusetis, proponis al ŝi cigaredon, kaj ŝi diris, "Dankon, mi ne fumas," kaj li mem ekfumis, nesciante, kion diri. Tiam kaj tiam ŝi rigardis al li kun stranga mieno, kvazaŭ ŝi atendas iun certan vorton de li. Stranga estas la sorto, vere stranga. Dum jaroj kaj jaroj oni atendas, ĝis oni trovos certan personon, iun, kiun oni vidas ofte en revoj, sed neniam vidas en la realo, ĝis subite, en tiu momento kiam oni ne atendas tion, tiu persono estas tie. Kaj la ŝanco prezentas sin, sed oni estas surprizita, kaj embarasita, kaj oni ne scias kion fari, kion diri, kaj oni lasas eskapi la ŝancon. "Ĉu vi loĝas en la insuloj ?" ŝi diris, kaj li respondis, "Ne, mi nur libertempas". Post paŭzo, sufiĉe longa por ke la nebula fajfilo sonis eble tri fojojn, li diris, "Ĉu vi loĝas en la insuloj ?" kaj ŝi respondis, "Jes," kaj post tio li proponis ke ili trinku kafon, ĉar li ne sciis ion alian por diri. Li sciis, ke post ne longe, ili forlasos la pramŝipon. Li devas, li devas diri ion, por ne perdi ĉi tiun ŝancon, kiun la sorto fine, finfine, portis al li. Sed la vortoj ne venis, ĝis la knabino rigardis subite en lian vizaĝon, kaj diris, "Vi estas stranga homo. Ĉu vi ne scias konversacii kun knabino ? Aŭ eble la knabinoj ne plaĉas al vi ?" La sango kuris al lia kapo, li balbutis, "jes, jes, ili plaĉas al mi, mi volas diri—vi plaĉas al mi tre multe, kaj—kaj" li haltis pro la embaraso, kaj ŝi ridis al li. Ridis al li ! Tamen, ne estis ŝia kulpo, la kulpo estis lia, ĉar li estis tia stultulo, ke li ne sciis kion diri al ŝi. Sed ĉi tiun fojon, li ne estos tiel stulta. Li iros al ŝi, tie en la vendejo, kie ŝi laboras, kaj li diros al ŝi, Mario, mi estis stulta naivulo, sed mi amas vin, vin, Mario, mi amas vin . . .

Li vidis, ke lia cigaredo ne plu brulas. Li prenis novan, bruligis ĝin, kaj rigardis al sia horloĝeto. Post kelkaj minutoj oni alvenos. Post kelkaj minutoj li vidos ŝin. Johano, ŝi diros, vi venis, vi venis . . .

La ŝipo naĝis preter terfingro, kaj subite la dokaro estis videbla. Eble kvin minutojn nun. Kun aliaj pasaĝeroj Johano iris al la ŝtuparo, malsupreniris al la motorferdeko. La suno brilis forte, sed elektra lampo funkciadis senbezone. Pasintan fojon, ili staris sub tiu lampo en la nebulo,

ĵus antaŭ la albordiĝo, kaj li sentis la bezonon diri ion, kaj li diris, "Ĉu mi povas skribi al vi ?" kaj ŝi ridis, kaj diris, "Nu, kion vi skribus al mi ?" Li hontis, ĉar li konstatis, ke ŝi estas prava. Li ja estas fuŝulo, li neniam havis talenton pri vortoj. Ŝi diris, "Ne, mia kara, korespondado estus sencela, ĉar ni ne vidos unu la alian denove." Sed ŝi nur duone pravis pri tio, ĉar la sekvintan tagon, Johano kaŝe vidis ŝin dum ŝi eniris la vendejon en la ĉefa strato por la deĵorado. Li vidis la ŝildon super la vendejo : Morton's Store, Manĝaĵoj kaj Ĝeneralaj Varoj. Poste li skribis, multajn fojojn, al Mario Thompson, ĉe Morton's Store, sed respondon li neniam ricevis.

La pasponto frapis kontraŭ la pruo, kaj Johano konstatis, ke oni alvenis al la doko. Li rigardis la horloĝeton. Iom post la tria, bone, nur kelkajn minutojn nun . . .

Sur la doko, Johano sentis la embarason kreski, la koro ektamburis. Ne, ne, Johano mia, li pensis agite, ĉi tiun fojon ne, oni regu sin, oni paŝu fiere, kaj oni memoru la vortojn. Li haltis, por kolekti la kapablojn nur, eble fumi nur unu cigaredon, estas bela tago, oni ne devas rapidi pri tia afero. Ŝvito ekaperis sur la frunto, kaj li forviŝis ĝin per ĉifita manumo, ensuĉante la fumon rapide kaj nerve. Li cirkaŭrigardis, kaj vidis, ke neniu rimarkas lin. Enspiregante profunde, li forĵetis la cigaredofinon kaj iris per rapidaj paŝoj laŭ la ĉefa strato.

Li venis al la pordo de la ĝenerala vendejo, malfermis ĝin, kaj eniris. En la vendejo vidiĝis kelkaj insulanoj starantaj apud la vendotablo, rigardantaj al la diversaj varoj—konservitaj manĝaĵoj, freŝaj legomoj kaj fruktoj, la malfermaj kestoj kun terpomoj. Sentante la ruĝon supreniri al la vizaĝo, li iris du paŝojn al flanko, de kie li povis vidi la du vendistinojn. Nur el angulo de unu okulo li kaptis ekvidon de virino, simple vestita, kun longaj malbone frizitaj nigraj haroj. Ŝi estis iomete dika, la trajtoj havis tute ordinaran aspekton ; kaj ŝi ne rimarkis Johanon.

Li forprenis la rigardon. Ne, nun ne estas konvene. Tro multe da homoj ĉi tie nun. Oni atendu momenton, elektu la ĝustan tempon. Nerve, Johano turnis sin al montraĵo de konservitaj supoj. La supoj, zorge aranĝitaj en piramido, havis ĉiu la saman etikedon. Liaj vangoj brulis pro troa sango, kaj lia kapo ekdoloris. Nu, oni devas ludi la ĝustajn kartojn nun. Li turnis la vizaĝon al la vendotablo—jen ŝi—nun oni faru la paŝon ! kaj li iris al ŝi.

"Jes ?" En ŝia parolo ne estis signo de rekono. Certe ŝi memoras min ! Kial ŝi rigardas al mi, sen ia esprimo ? Kial ŝi ne diras, Johano, vi venis al mi, mi ĉiam sciis, ke vi venos al mi.

"Jes ?" ŝi ripetis.

"Mi vo——" Lia voĉo ne sukcesis aŭdebligi la vorton. Li tusetis. "Mi volas aĉeti pakaĵondecigaredoj.'

Mario turnis sin al montrobreto. "Kiajn ?"

"Ne gravas. Chesterfield."

Johano metis la manon en la poŝon, eltiris monaĵon kaj metis ĝin sur la tablon. Li ne relevis la okulojn, sed prenis la monerojn, kiujn la virino ĵetetis antaŭ li, kaj la cigaredojn. Li respondis per duongesto de la kapo la sentonan "Dankon" de la vendistino, kaj forturnis en plena embaraso al la pordo.

Johano paŝis denove en la sunlumon, hezitis sur la stratrando, kaj bruligis cigaredon.

# *Belarta Konkurso de U.E.A. 1953*

## Unua Komuniko

### Literatura Sekcio

POR la kvara fojo ni invitas niajn verkistojn konkuri en la Belarta Konkurso. La verkoj estos juĝataj de kvinmembra internacia komisiono. La gajnintoj estos proklamataj kaj la premiitaj verkoj deklamataj dum la 38-a Universala Kongreso en Zagreb. La ĉefpremian drameton oni eventuale prezentos.

**Premioj.** Ĉiu premiito ricevos diplomon kaj ankaŭ monpremion.

**La branĉoj** estas :—

A. Originala Poezio (maksimume 108 versoj per 1, 2 aŭ 3 poemoj),

B. Tradukita Poezio (maksimume 108 versoj per 1, 2 aŭ 3 poemoj),

C. Originala Prozo (ĉiu prozaĵo maksimume po 200 maŝinskribitaj linioj po proksimume 65 spacoj),

D. Originala Drameto (ludodaŭro maksimume 25 minutoj).

Oni rajtas partopreni per maksimume 3 verkoj en ĉiu branĉo.

**Rajtas konkursi** ĉiu, kiu aliĝis al la 38-a Universala Kongreso aŭ kiu estas individua membro de U.E.A. (ĉu rekte, ĉu per "adopto").

**Sendu la verkojn** kvinekzemplere al la Peranto,

S-ro Ken Lawrence,
244 Quinton Road,
BIRMINGHAM 17,
Anglujo.

Ĉe tradukitaj poemoj aldonu kvin ekzemplerojn de la originalo. Skribu sur ĉiu konkursaĵo vian pseŭdonimon kaj sur aparta slipo la pseŭdonimon kun via vera nomo kaj adreso (kaj eventuale kun via kongresnumero). La Peranto havas la devon konservi la anonimecon de partopreno.

**Limdato.** La limdato por ricevi de la konkursaĵoj estas la 30-a de Aprilo, 1953, por la dramo, kaj la 31-a de Majo, 1953, por la ceteraj branĉoj.

**Konkursa Kotizo.** Ĉu oni konkuras en unu aŭ en pluraj branĉoj, oni kotizas jene. Britoj sendu 1ŝ. 6p. En aliaj landoj, de kie oni rajtas sendi respondkuponojn, sendu 3 respondkuponojn (maldekstre stampitajn), aŭ malpli, laŭ la enlanda permeso. En landoj, de kie estas malpermesate sendi respondkuponojn, la partopreno estas senpaga.

Nevalidaj estas verkoj aperintaj en presa formo.

Ĉe la tradukitaj poemoj oni zorgu eventuale pri la represrajto.


Laŭeble la premiitaj verkoj aperos en la organo *Esperanto*.

**Mondonacoj al la Belarta Konkurso.** Grupoj aŭ individuoj rajtas subteni la Konkurson aŭ iun ĝian branĉon per mondonaco. Kiam oni donacas al aparta branĉo la premio ricevas la nomon de la donacinto.

Grupoj kaj individuoj rajtas ankaŭ proponi novajn branĉojn, kiujn ili volas premii.

**Landaj gazetoj**
**bonvolu represi ĉi tiun informon !**

*R. Rossetti, sekretario.*



# *Radio kaj Esperanto*

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Por somera tempo oni aldonu laŭ neceso—kutime 1 horon.

*Mallongigoj :* I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso, M=Muziko

| | | |
|---|---|---|
| **Lundo** | 18.00–18.30 | Rabat. 482m. K (franclingve). Radio-Maroc, Rabat, Maroko. |
| | 22.15–22.40 | Hilversum, 298m. kaj 188m. I.M. (ĉiun duan lundon) : V.A.R.A. Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando. |
| **Mardo** | 00.45–01.00 | Bauru. 91m., 240m. K. I. Radio Bauru, Brazilo. |
| | 07.45–08.00 | Lille. 235m. K. I. Esperanto, 94 rue de la Rochelle, Tourcoing, (Nord), Francujo. |
| | 11.55–12.00 | Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern. |
| | 15.00–15.15 | Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon). |
| | 17.35–17.40 | Bern. 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur. |
| **Merkredo** | 15.45–16.00 | Graz. 417.2m. K (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo. |
| | 18.00–18.20 | Roma. 25.21m., 31.35m., 49.92m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vittorio Veneto 56. |
| | 19.30–20.00 | Madrid. 225m., 42.33m. P. Radio S.E.U., Sección Esperanto, Diego de León 49, Madrid, Hispanujo. |
| | 21.35–21.40 | Wien. 513m., 25.46m., 48.74m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo. |
| **Jaŭdo** | 08.30–08.45 | Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo. |
| | 11.55–12.00 | Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat. |
| | 17.35–17.40 | Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat. |
| **Vendredo** | 18.00–18.20 | Roma. Kiel merkrede. |
| | 22.15–22.30 | Hilversum. 402m. P. (nur 14.XI. kaj 12.XII.) N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando. |
| **Sabato** | 08.30–09.00 | Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo. |
| | 22.15–22.20 | Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando. |

**Aŭstra Radio :** Ni estos dankemaj al niaj legantoj, kiuj povas kapti la aŭstrajn elsendojn el Wien kaj Graz, se ili bonvolos informi S-ron Larglantier pri la aŭskultebleco en sia regiono de ĉi tiuj stacioj kaj sciigi al ni, por la profito de ĉiuj aliaj legantoj, la eventualajn farotajn ŝanĝojn al la ĉi supre publikigita programo. Manko de informo el la stacioj ne ebligas al ni presigi fidindan programon.

**Radio Roma:** *en novembro:* 5, Turismo : Rekonstruado en Latiumo ; 7, Insulo "Giglio"—Fremdulo en la province de "Reggio Calabria"; 12, la nova teatro *Alla Scala* en Milano ; 14, La internacia lingvo en la scienco kaj en la tekniko ; 19, *La malgranda blua aŭtomobilo*, novelo ; 21, Teknika-historia ekspozicio pri la haveno de Genova ; 26, por geknaboj, *Pinokjo* ; 28, Urbo "Subiaco"—Inaŭguro de la rekonstruita katedralo de S. Andreo. *en decembro :* 3, Riveroj, lagoj kaj montoj de Italujo, 5, Torino : La teknika internacia ekspozicio. (**Vidu ankaŭ p.** 322).

# UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

**Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo**

**OFICIALA INFORMILO**

**N-ro 243** **4-an de Oktobro 1952**

**STATISTIKO.** Jen la stato de la membraro je la 30a de Septembro, kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1951 :

| | 1951 | 1952 |
|---|---|---|
| Asociaj membroj | 7363 | 7057 |
| Individuaj membroj | | |
| MJ .. .. | 874 | 907 |
| MA .. .. | 4505 | 3759 |
| MS .. .. | 277 | 515 |
| Patronoj .. | 16 | 10 |
| DM .. .. | 230 | 264 |
| HM .. .. | 59 | 58 |
| | 5961 | 5513 |
| | 13324 | 12570 |

## DELEGITOJ

### Aŭstralio

**Albany.** D : vakas.

**Canberra** (A.C.T.). FD (Tajloraj aferoj) : S. Fulop, 6, 10th St., Narrabundah.

### Brazilo

**Juazeiro** (Bahia). D : J. Martins de Souza, Praça da Bandeira 44.

### Germanujo

**Bad Salzuflen** (Lippe). D : W. Flick, Pohlmanstr. 16.

**Kaiserslautern.** FD (Kuracistaj aferoj) : D-ro Fr. Besold, Schillerplatz 7. Tel : 2576.

### Kubo

**Camaguey.** FD (Filatelo) : M. Torrado Rodriguez, Gonzalo de Quesada 552.

### Libano

**Bejrut.** D : Faruk Abul-Dahab, American University of Bejrut, P.O. Box 5. Tel : 24-54.

### Norvegujo

**Fornebu.** D : vakas.

### Urugvajo

**San José.** D : F-ino M. J. Vila, Vidal 421. Tel : 388.

## NOVA DUMVIVA MEMBRO

Simon, S-ro P. E., Porto Alegre, Brazilo

## MEMBRO-SUBTENANTOJ 1952

515. Pinto, S-ro H. L., Itajubá, Brazilo
516. Silva, S-ro M. M. F., Rio de Janeiro, Brazilo
517. Corrêa Azevedo. S-ro E. N., Rio de Janeiro, Brazilo
518. Cavalcanti Filho, S-ro M., Joao Pessoa, Brazilo

**DONACOJ.** C. Brunet 21ŝ., E. G. Lane 5ŝ., V. Salonen 1ŝ. 9p., F-ino H. Wolff 5ŝ.

**Sinceran dankon al ĉiu helpanto.**

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

---

# *Internacia Konkurso 1952*

## Stato je la 30a de Septembro 1952

| | Lando | Kvoto | Poentoj | % |
|---|---|---|---|---|
| 1. | Izraelo .. | 350 | 495 | 141.4 |
| 2. | Brazilo .. | 4500 | 5418 | 120.4 |
| 3. | Norvegujo .. | 1700 | 1995 | 117.4 |
| 4. | Maroko .. | 500 | 575 | 115.0 |
| 5. | Kanado .. | 250 | 270 | 108.0 |
| 6. | Nov-Zelando | 800 | 860 | 107.5 |
| 7. | Italujo .. | 2200 | 2290 | 104.9 |
| 8. | Islando .. | 400 | 410 | 102.5 |
| 9. | Urugvajo .. | 250 | 255 | 102.0 |
| 10. | Japanujo .. | 900 | 905 | 100.6 |
| 11. | Germanujo .. | 3200 | 3195 | 99.8 |
| 12. | Aŭstralio .. | 850 | 845 | 99.4 |
| 13. | Svislando .. | 1400 | 1380 | 98.6 |
| 14. | Sud-Afriko .. | 300 | 290 | 96.7 |
| 15. | Nederlando .. | 4800 | 4537 | 94.5 |
| 16. | Belgujo .. | 2300 | 2141 | 93.1 |
| 17. | Francujo .. | 5500 | 5087 | 92.5 |
| 18. | Usono .. | 2500 | 2278 | 91.1 |
| 19. | Danlando .. | 2700 | 2455 | 90.9 |
| 20. | Britujo .. | 12000 | 10506 | 87.6 |
| 21. | Hispanujo .. | 1300 | 1125 | 86.5 |
| 22. | Finnlando .. | 2600 | 2105 | 81.0 |
| 23. | Svedujo .. | 5200 | 4070 | 78.3 |
| 24. | Kubo .. | 250 | 185 | 74.0 |
| 25. | Portugalujo .. | 800 | 580 | 72.5 |
| 26. | Aŭstrujo .. | 1000 | 715 | 71.5 |
| 27. | Irlando .. | 250 | 170 | 68.0 |

# ANONCETOJ

*Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.*
**Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.**
**Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.**

**Provu kaj vidu,** kiel bona estas la Eternulo ; Feliĉa estas la homo, kiu Lin fidas. Ps. 34. 8.

**Esperanto-Asocio de New York** kunvenas ĉiumonate. Ĉiuj bonvenaj. Telefonu : BU-4 0963. Dormont.

**La Sunkrono** estas bela verko de nederlanda verkistino Marie Koenen (tr. v.d. Vijver). Prezo 2ŝ. 3p., afranko 4p. (8 rpk.) Mendu ĉe UEA aŭ vialanda libroservo.

**Giordano B. Lôpez,** Amalia 347, BUENOS AIRES 8, Argentino. 50-100 pm., ripetitaj aŭ ne, k. ĉ. 1.

**LERNIGU VIAJN INFANOJN laŭ la angla maniero ! Progresema lernejo sendependa bezonas internulojn el ĉiuj landoj. Vidu kovrilpaĝon 4 de la maja numero kaj skribu al la lernejestro, Caius School, Kingston Buci, SHOREHAM-BY-SEA, Sussex, Anglujo.**

**Mi deziras korespondi** kaj interŝanĝi poŝtkartojn kun la tuta mondo. Respondo garantiata. Skribu al Raimundo Sacramento Sampaio, Setor Aéreo, Correio Geral, SALVADOR, Bahia, Brazilo.

**Letervespero** 11/12. Multaj deziras korespondi pri ĉiuj temoj. Lunds Esperantoklubb, E. Dahlbergsgatan 3 b, LUND, Svedujo.

**S-ro Jean Réquillard,** fervojisto, La Croix Moreau, VIERZON (Cher.) Francujo, deziras interŝanĝi afrankitajn poŝtkartojn kun ĉiuj landoj.

**Leganto,** vi kontribuos al grava venko, petante ilustritajn prospektojn turistajn en Esperanto ĉe Belglanda Turista Oficejo, Belliardstr. 1B, Brussel, Belgujo.

**Se vi deziras korespondi** kun junaj, 16-20 jaraj Esperantistoj (ĉ. 30) en porinstruista seminario, adresu al : A. Fehr, Lehrerseminar, LEBACH, Saarlando, Eŭropo. Certe respondos al ĉiuj geesperantistoj el la tuta mondo, kiuj nin skribos.

**Kun Svedino** deziras korespondi pri hejmaj aferoj F-ino Eileen de Burgh Daly, Penshurst, OKEHAMPTON, Devon, Anglujo.

**Mi deziras kolekti** el la tuta mondo alumetskatolajn etikedojn por interesata grupo. Reciproke mi sendos belan il. vidaĵkarton aŭ etikedojn. Dhonaŭ, 9 Cromer Road, SHERINGHAM, Norfolk, Anglujo.

**20 gejunuloj,** 14–22 jaraj, deziras korespondi tutmonden. Adreso : Junaj Esperantistoj, NORDSEEBAD BÜSUM, Strandstr., Germanujo. Certa respondo.

**Deziras interŝanĝi pm.** kun ĉiuj landoj, speciale Polujo, Svislando, Islando, samvalore kontraŭ skandinavaj, speciale svedaj, novaj kaj malnovaj, laŭ katalogoj Zumstein kaj Scott. Alfons Andersson, Lasarettet, KARLSKOGA, Svedlando.

**Ludkartojn** (ekz. ekstrakarto aŭ Jokero) kaj esperantistajn "Ex libris" kolektas S-ro A. W. Ahlm, Pontonjärgatan 33, STOCKHOLM K., Svedujo, kaj rekompencos per esp. libroj.

**Esperantisto,** 31-jara, deziras korespondi kun samideanoj ekster Eŭropo pri diversaj temoj, letere, bildkarte. Adreso : J. Beltzer, Zaanenstraat 42, HAARLEM, Nederlando.

**Internacia Kultura Semajno,** 3-10 Aŭgusto 1953 en Kultura Esperanto-Domo, Grésillon. Informas detale kontraŭ internacia respondkupono G. Odent, Lycée de LAON, Aisne, Francujo. Represo petata.

**Kultura Esperanto-Domo** akceptos laŭeble de Junio ĝis Septembrofino ĉiulandajn Esperantistojn. Eventuale iam ajn ankaŭ karavanojn. Informpeto sendota kun internacia respondkupono al Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, BAUGE, M.et-L., Francujo. Represo petata.

**Germana Esperantisto** deziras korespondi kun eksterlanda pentristo-dekoristo. Adreso : Hans Laskowski, Fahnerstr. 168, DUISBURG-HAMBORN, Germanujo.

**Ni pagas por tri interesaj fotoj** kun klariga teksto kvinjaran MA-kotizon. Informojn ĉe IJOC per S-ino Van Quickelborné, Guido Gezellelaan, BRUGGE, Belgujo. Aldonu respondkuponon. Anonceto ne validas por Eŭropo.

**19-jara ĵurnalisto** deziras korespondi kun samaĝaj gesamideanoj ekstereŭropaj. Interesiĝas pri poŝtmark- kaj gazetkolektado, fotografado kaj vojaĝado. Carl Göransson, Finntorpet, HUDIKSVALL, Svedujo.

# *38-a Universala Kongreso de Esperanto*

**ZAGREB, 27 JULIO—3 AŬGUSTO 1953**

---

Adreso :

POŜTFAKO 213, ZAGREB, JUGOSLAVUJO

Aliĝilojn kaj pagojn akceptas ankaŭ

U.E.A., HERONSGATE, RICKMANSWORTH, ANGLUJO

# ALIĜILO

**Mi aliĝas al la 38-a Universala Kongreso de Esperanto en Zagreb, kaj samtempe mi sendas pagon.**

Familia nomo[1] S-ro, S-ino, F-ino .....

Antaŭnomo (voknomo)[1] .....

Strato kaj numero[1] .....

Urbo[1] .....

Provinco[1] .....
(*nur en landoj, kie la poŝto postulas tion*)

Lando[2] .....

Profesio[2] .....

Nacieco[2] .....

Antaŭnomo de edzino aŭ infano, kiu samtempe (pere de apartaj aliĝiloj) aliĝas al la Kongreso .....

Naskiĝa jaro de persono malpli ol 20-jara .....

Dato .....

.....
(*subskribo*)

[1] *En nacia lingvo* [2] *En Esperanto*

*Aliĝoj ne estos akceptataj post la fino de junio* 1953

**Skribu klare, se eble per skribmaŝino**

---

## KONGRES-KOTIZOJ

| | aĝis 31/12/52 | aĝis 31/3/53 | poste |
|---|---|---|---|
| *Kongresano .. .. | 35 ŝil. .. | 40 ŝil. | 45 ŝil. |
| Edzo aŭ edzino de kongresano | 15 ŝil. .. | 17ŝ. 6p. | 20 ŝil. |
| Junul(in)o ne pli ol 20-jara .. | 12 ŝil. .. | 13ŝ. 6p. | 15 ŝil. |

* Individuaj membroj de UEA pagas 5 ŝil. malpli.

Printed by SUMFIELD & DAY LTD., Station Street, Eastbourne, for the Publishers, UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Esperanto House, Heronsgate, Rickmansworth, Herts.